HUNGARA VIVO

MEGYEI KÖNYVTÁR
SALGÓTARJÁN



3

1969

8,—Ft

»TECHNOIMPEX«

HUNGARA MAŜININDUSTRIA ENTREPRENO POR INTERNACIA KOMERCO

EKSPORTAS:

ilmaŝinojn
kablomaŝinojn

maŝinojn de telekomunika tekniko
maŝinojn por plastaĵoj



PETU DETALAJN PROSPEKTOJN PRI NIAJ FABRIKAĴOJ

Budapest, V. Dorottya u. 6. – Budapest 62. P. O. B. 183 Telefono: 184–950
180–830 Telegramo: Technoimpex Budapest 994, 995, 617

HUNGARA VIVO

Kvaronjara revuo de la Hungara Esperanto-Asocio
Budapest VIII., Kenyérmező utca 6.

☆

1969, IX-a jaro, 3-a numero

Nia forumo: — *Gábor Vigh:* 1
András Simonffy: Bonega tago *Tr. L. Tárkony* 2
Kiu estis Julio Baghy? — *Vilmos Benczik, Ludoviko Kökény, Péter Rados* 4
Valéria Szabó: Panoramo 6
Lajos Lesznai: Muzika vivo en Hungario en printempo de 1919 8
Gasta paĝo de *Edwin de Kock* 9
Miguel Angel Asturias, Pablo Neruda: Manĝante en Hungario *Tr. K. Kalocsay* 10
Mór Korach: Pensoj pri la internacia lingvo 12
K. Kalocsay: Domfabriko 12
Lajos Tárkony: Esperanto 13
Ada Csiszár: Esperanto en la Hungara gazetaro 13
Mária Szabó: La Hungarlanda Esperanto-Muzeo kaj Biblioteko 14
El novaj poemoj de *István Simon* 16
Mihály Gergely: Kálmán Csohány 16
Vilmos Benczik: Akcidento 18
I. Szerdahelyi: Metodo kaj Metodoj 20
József Szekeres: Maja rendevuo en Budapeŝto 21
G. Waringhien: La verko kaj la traduko 22
Originala Esperanto-Poezio de *P. Avar* 23
Lajos Jánossy: Pensoludo pri la ritmo de la tempo. Trad. János Tóth 24
Korespondi deziras 24
J. Ingusz: Internacia Esperanto-Ekspozicio de Infandesegnajoj en Budapesto 25
Nia humuro 26
T. Völgyi: Esperanto 2 —Daŭriga kurso 27
Sz. Bálint: Krucenigmo 27
Tibor Vasko: Esperanto, Studobjekto en la Budapeŝta Universitato 28
Novaĵo de Esperantujo 30
Leterkesto 30
Glosaro 31
M. Lett: Filatelio *Tr.: L. Kökény* 32
E. Fenyvesi: Latva poezio — 1945—1966 ... 32
M. Nádasdi: Kiamaniere redonis mian vivemon Esperanto? 32

Sur la kovrilpaĝo — Kálmán Csohány: Ŝvebo

Ĉefredaktoro: *Mihály Gergely*
Responda redaktoro: *d-ro Jozefo Mátéffy*
Lingva revizio: *K. Kalocsay*
Arta redaktoro: *Józefo Szekeres*

Redaktoraro:

d-ro Pál Avar, d-ro István Bácskai, Szilárd Bálint, Imre Botos, Ervin Fenyvesi, Lajos Lesznai, Alfonso Pechan, Auréll Ponori Thewrewk, Valeria Szabó, d-ro István Szerdahelyi, Tibor Ujlaky-Nagy Gábor Vigh

Ĉefkunlaborantoj:

D-ro Géza Bárczi, Paŭlo Balkányi, Károly Jobbágy, Mór Korach, Ludoviko Kökény, Sándor Szathmári, Lajos Tárkony

La redakta komitato la unuan kaj trian jaudon de ĉiu monato posttagmeze de la tria ĝis la sesa horo havas akceptotagon. (Bp. VIII., Kenyérmező utca 6.)

Eldonas: „Népszava" Gazeteldona Entrepreno, Budapest, VII., Rákóczi út 54.
Telefono: 224—819

Responda eldonisto: Márton Gábor direktoro

Disvastigas la Hungara Poŝto. Abonebla en ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K. H. I., Budapest, V., József nádor tér 1.) senpere, aŭ per ĉekenpagilo, por individuaj abonantoj la ĉeknumero estas 61 280, por neindividuaj 61 066.

La abono estas por jaro Ft 32.-, al eksterlando krome Ft 6.40 poŝtelspezo.

69.67816 Akadémiai Nyomda, Budapest
Responda gvidanto: György Bernát
Indexszám: 25.377

NIA FORUMO

ALPAROLO

Renoviĝi... Kiam ĉefredaktoro Mihály GERGELY skribis ĉi tiun vorton super sian artikolon en la dua numero de la renovigita Hungara Vivo, li elparolis ion treege aktualan, sed ĝis nun ne diritan: en la epoko de komputiloj, supersonaj aviadiloj kaj kolora televido la disvastigo de Esperanto ne povas okazi en la maniero de la 19-a jarcento.

Kio estis la motivo de la rapida sukceso de Esperanto je la fino de la 19-a jarcento en Pollando, Germanujo kaj en Ruslando de la caroj? Kial naskis la Unua Mondmilito grandulojn por Esperanto? La respondo al la demandoj estas simpla: Esperanto prosperis, ĉar ĝi helpis kompreni kaj solvi la plej gravajn problemojn de la tiama epoko. La unua konkludo de mia direndo estas do: se ni serioze kaj sincere volas renovigi la Movadon kaj disvastigi la Internacian Lingvon, ni devas modernigi la metodojn, ĝustigi la „Internan Ideon" al la postuloj de la moderna erao.

Kio estas la plej akra, plej sankta ideo de nia postmilita (aŭ intermilita?!) epoko? La konservo de la paco.

Ĉu la „Interna Ideo" ne devus manifestiĝi pli palpeble, pli konkrete? Ĉu la „Interna Ideo" ne devus elpaŝi el la lernolibroj kaj kortuŝaj noveloj? Ĉu la Esperanto-verkistoj ne devus krii pasie pro doloroj de nia epoko, pro ĝojo kaj malĝojo, por ke la mondo fine ekaŭdu ilin?

La dua paŝo sur la vojo de renoviĝo estu pli aktiva partopreno en la publika vivo de la lando, kies civitanoj ni estas. Esperanto-gazetoj okupu sin ne nur pri movadaj kaj lingvaj demandoj, sed ankaŭ pri problemoj komuninteresaj. Ni descendu la „eburan turon" de komforta izoliteco! Ni ne fermu nin en klubojn babiladajn, asocietojn silentajn!

Ŝajnas post la supre diritaj, ke laŭ mia opinio renoviĝo estas bezonata nur en la movado, en la sinteno de esperantistoj kaj la lingvo mem ne gravas. Ne temas pri tio. Kontraŭe. Mi ĉiam kaj ĉie emfazas, ke Esperanto, antaŭ ĉio, estas lingvo, internacia lingvo, laŭ esperantistoj la plej taŭga ilo por internaciaj kontaktoj. Ĉi tion ni devas klarigi al la homoj, precipe al gejunuloj, per 20a-jarcentaj, modernaj metodoj.

La unua, la plej grava metodo estas: ni esperantistoj lernu kaj parolu Esperanton perfekte. Per bona lingvoscio ni devas demonstri al simpatiuloj kaj nekreduloj, ke Esperanto estas facile lernabla kaj fruktodone uzebla. Kiel ofte ni balbutas! Ni ne balbutu! Ni lernu!

Ni lernu kaj instruu aliajn. Precipe gejunulojn. Mi konas instruistojn esperantistajn, kiuj faras preskaŭ nenion por Esperanto en sia lernejo, kvankam ĉiuj devus scii, ke la procezo de renoviĝo komenciĝas per la rekono, ke la plej grava garantiaĵo por la disvastiĝo de la Internacia Lingvo estas la konverto de la junularo al Esperanto. La estonto de Esperanto kaŝiĝas en la junularo.

En la junularo. Sed ne nur en homoj, junaj laŭ la nombro de jaroj; la estonto kaŝiĝas ankaŭ en junaj nacioj, kiuj nun vekiĝas el jarmila dormo al nacia ekzistado. Ili komencas estigi internaciajn rilatojn. Iliaj delegitoj estas jam en internaciaj organizaĵoj, ili jam oratoras en la Organizaĵo de la Unuiĝintaj Nacioj. Sed en kiuj lingvoj? En la angla kaj franca. Kial ne en neŭtrala internacia lingvo?

En la spirito de renoviĝo mi proponas al la esperantistaro: ni direktu nian atenton al la junularo en ĉiu lando kaj al la junaj popoloj en Afriko, Azio kaj Ameriko. UEA faru la necesajn paŝojn proponante al delegitoj kaj registaroj de la evoluantaj landoj enkonduki Esperanton en la lernejoj kaj en internaciaj rilatoj, kaj proponante al UN kaj UNESKO, ke oni sendu ankaŭ esperantistajn instruistojn al tiuj landoj labori kontraŭ analfabeteco, disvastigi kulturon, instrui homojn pri bazaj konoj de industrio, agrokulturo — instruante kompreneble ankaŭ Esperanton.

Gábor VIGH

Sekcioestro de la Hungara Instituto Por Kulturaj Interrilatoj

András Simonffy

BONEGA TAGO

Lia dormo estis trankvila. Li ne turniĝadis, nek unufoje li vekiĝis abrupte, li ne frostetis, ne ŝvitis. Matene tuj kaj tute li vekiĝis, kiel la infanoj. Li frotis siajn okulojn kaj tuj ellitiĝis. Li etendis la manon al cigaredo, sed ĉi-tage li sukcesis bremsi sian movatan brakon: — Ne — li decidis —, hodiaŭ ne per cigaredo mi komencas la tagon. — Kaj li ne ekfumis.

Li enportis la gazeton, trarigardis la artikoltitolojn. La titoloj dum du minutoj restis en lia kapo, sed ankaŭ poste li bone memoris pri tio, ke tiutage estis morta sezono: sen mondkrizo, sen mortaj akcidentoj kaj sen eksperimenta eksplodigo. Oni presis la tiutagan numeron sur brilan, glatan paperon. Ankaŭ tio estis bona.

— Ankaŭ kafon mi ne trinkos — li diris.

— Kion vi diris, karulo?

— Nur tion, ke mi ne trinkos kafon. Mi iros malsupren por lakto. Ĉu alporti ankoraŭ ion?

— Ĉu vere vi iros malsupren? Ni bezonus panon kaj sukeron. Se eventuale vi vidus ŝafofromaĝon . . . Tio al li ne plaĉis: ,,se vi iros malsupren'', ,,ni bezonus'', ,,se vi vidus'', ,,eventuale'' . . . Li iros malsupren: estas bezonataj: pano, sukero, ŝafofromaĝo. Tiuj estas certaj aferoj. Se ne estas ŝafofromaĝo, tio estas alia. Eĉ tiam ne ,,eventuale''.

— Hodiaŭ mi ne moliĝos en la varma akvo — li diris al tiu haraĵa juna homo, kiu el la spegulo scivole lin alrigardis. Kaj li ne moliĝis. Dum minutoj li frotadis sin sub la glacimalvarma duŝo. Tiam li jam sciis, ke tiutage li iros ankaŭ en naĝejon.

En la laktovendejo li staris vicon. En bela, preciza, unusenca vico. Li ricevis ankaŭ ŝafofromaĝon. Li estis feliĉa.

Ankoraŭ en la vendejo li trinkis la lakton kaj almanĝis du bulkojn. Ĉiun peceton ĝisfunde li tramaĉis kaj post ĉiu maĉado li trinkis unu-du glutojn da lakto. Li ne rapidis.

— Nun mi iros supren — li decidis. — Kaj mi razos min.

Li uzis elektran razilon, sed li havis ankaŭ razilon klingan. Li prenis tiun ĉi razilon kaj sapumis sian vizaĝon. Longe li razis sin. Li ĝuis tion. La doloron kaj la longan, mutan dialogon kun si mem en la spegulo.

— Mi devas foriri.

— Nun? Kien vi iras dimanĉe matene? Kiajn vojojn vi havas?

—En naĝejon. — Li diris tion en natura voĉo, kiel iu, kiu parolas pri memkomprenebla afero. Lia edzino kun milda suspekto lin rigardadis. Kaj ŝi redemandis: — En naĝejon? Tio estis malbona. La sola malbona tiutage. Kial tio estus tiel stranga? Li foriros, kaj fino.

Li sin malvestis. En la vestiĝejo aŭdiĝis laŭta babilado, pri virinoj, sportkonkursoj. Dum iom da tempo ŝajnis al li, ke ĉiu rigardas lin kaj ĉiu jam scias pri li, ke li plu ne vizitas la naĝejon sisteme. Sed neniu sciis tion. Neniun tio interesis. Kiu estas ĉi tie, tiu estas ĉi tie. La akvo estas la esenco.

Jam estis humida aŭtuno, liajn nudajn plandojn, lian haŭton pikis malvarmo. Li ne kuris, li lasis, ke ĝi lin piku.

Plonĝo en la akvon. La akvo estas friska, sed supla. Vibras la etendiĝantaj, ŝrumpantaj verdaj kahelkvadratoj de la basena fundo. Frapi al la muro. Piedfrape svingiĝi for. Gliti sub la akvo. Enspiri aeron. Longe, profunde spiri . . .

Li frotis sin. La sana varmo de la vestaĵo. La pezo de la jako . . .

Dum la revojo li sidiĝis en kafejo, petis oranĝtrinkaĵon kaj du kazeajn buktojn. Ĝi estis pigra, dimanĉa kafejo. Sola li sidis ĉe tablo kaj manĝis la bukton. Kelkfoje malfermiĝis la pordo, tiam interesiĝante li alrigardis.

— Ĉu plaĉis al vi la naĝado?

— Ĝi estis bonega.

— Ankaŭ alifoje vi povus tien iri.

— Mi iros tien ankaŭ alifoje.

Lia filo surventre kuŝis sur la tapiŝo. Li puŝadis sian aŭtoludilojn. Li surgenuiĝis apud li. — Nu, kiom da jaroj vi havas? — li demandis.

— Tri kaj duonon. Jen Skoda. Ĉu vi ĝin vidas?

— Mi vidas. Ĉu vi venos kun mi ien? — La okuloj de la eta knabo ekbrilis. Kial ili ekbrilas, li pensis, dum ĉiam mi volas lin kunporti ien. Li devas scii, ke ĉiam mi volas lin kunporti . . .

— Kion vi pensas — li demandis —, ĉu knabo tri kaj duonjara estas jam granda knabo, aŭ nur eta knabo?

— Li estas nur granda knabo.

— Tiam ni povas iri.

Ili iris al la rivero.

— Vidu, ĝi estas la rivero — li diris al sia filo.

La knabeto rigardis la riveron kaj kapbalancis: — Sur la rivero iras la ŝipoj. El kio estas la rivero?

— Ĝi estas el akvo

— Kial?

Kaj ili haltis apud arbo.

— Vidu, ĝi estas arbo.

— Ĝi estas bela arbo. La arbo estas el ligno, ĉu ne?

— Ĝi estas el ligno.

— Kial?

Ili piedis supren sur la monton kaj vidis la urbon.

— Vidu, ĝi estas la urbo.

— La urbo estas el multaj domoj, ĉu ne?

— Jes. Domoj stratoj, pontoj . . . Ĉu vi komprenas?

Ili iris malsupren en la urbon kaj promenis inter la domoj.

Post iom da tempo la knabeto haltis. — Rigardu — li montris —, tie estas tabloj. Ni manĝu torton, ĉu ne? Tie ĝi povas esti bona. — Li serĉadis en la poŝo de sia jako, poste sian fermitan malgrandan pugnon li malfermis antaŭ sia patro kaj mallerte lin alrigardis: — Jen, vidu — li flustris. — Ankaŭ monon mi havas. — Sur liaj fingroj kuŝis brila dudekfilera monero.

— Nu, se vi ĝin havas, tiam mi estos via gasto.

Ili manĝis torton.

Post kiam ili manĝis la torton, la knabeto ekparolis:

— Nun jam estas malpura la telero, diru al la onjo, ke ŝi ĝin forportu. Mi ne amas, se ĝi estas malplura. — Kaj li ĝin forpuŝis. — Ankaŭ la via estas malpura. — Kaj ankaŭ ĝin li forpuŝis.

Survoje al la hejmo ili paroladis pri la aŭtoj. — Estus bone, se vi aĉetus aŭton — diris la knabeto. — Tiam multe ni povus kune iri, ĉu ne?

Embarasite li kapjesis. — Bone — li diris, kaj tenis pli firme la manon de la knabeto. Kaj li sciis: oni jam devas priatenti ĉi tiun knabon. Estis bone, ke li tion eksciis.

— Nu, kia estis la amuzo? Kie vi promenadis?

— Ni estis kune — respondis la knabeto.

— Kaj kion vi vidis, ĉu multajn aŭtojn?

— Ankaŭ aŭtojn. Kaj riveron. Kaj ni estis sur la monto.

— Sur kiu monto?

— Sur la granda-granda monto.

— Fakte, kie vi estis?

— En la urbo — li respondis kaj alrigardis sian filon. La knabeto rigardis en liajn okulojn kaj ridetis. — En la urbo — li ripetis post li — kaj ĉie. Kune.

Posttagmeze li gluumis la kadukan seĝon. Li tute profundiĝis en la laboron, eĉ ne rimarkis, ke dume vesperiĝis.

Ne estis brulligno en la loĝejo, li iris en la kelon kun hakilo. Li hakis lignon. Estus sufiĉaj unu-du ŝtipoj, sed li hakis multe pli multe. En la kelo estis mallume, li bruligis kandelon kaj hakis la lignon. Li elserĉis la plej dikajn rondajn lignojn, tiujn li dishakadis. Kiam li laciĝis, li sidiĝis sur ŝtipo kaj fumis cigaredon. Ĝi havis amaran guston, ĝi pikis lian langon.

Trifoje li faris la vojon, ses grandajn korbojn da brulligno li portis supren.

— Ĉu vi trinkus kafon?

— Ne, mi dankas.

— Sed kio do okazis al vi? — demandis zorgeme lia edzino.

— Al mi? Kial!

— Nu . . . mi eĉ ne scias. Hodiaŭ vi estas tiel stranga. Ĉu estas ia malfacilaĵo?

Tiam fine li ekridis. Nun ŝi aŭdis lian ridon klara, senombra. Malofte li ridis tiel barelvoĉe, stentore.

Li tiris la virinon al si, kaj malbutonumis ŝian bluzon. — Kion vi faras? Kion vi faras? Antaŭ la knabo . . .

Li turniĝis: — Vi, olda knabo, vi tri- kaj duonjarulo, eliru. — Li fermis la pordon. La virino staris tremante.

— Kion vi volas?

— Mi volas vin perforti.

— Ĉu min?

Li kapjesis. La bluzo disŝiriĝis: — Ve, mia bluzo! — La butonoj de la jupo derompetiĝis: — Ve, mia jupo!

— Ne interesas min via jupo. Ne cedu!

Sed ŝi cedis: — Ne! Ne! — Kaj longa, formortanta „O".

Poste li kuŝis surdorse. Li estis malstreĉiĝinta kaj serena. Poste li ekkubutumis, per siaj fingroj tenere li karesadis la bruston, ventron, femurojn de la virino kaj diris: — Vi, dolĉulino, se mia edzino scius, kiel bonegan amatinon mi havas . . .

— Sed mi estas ja via edzino de kvin jaroj . . . Aŭ de ses?

— Ĉu vere? — Li ŝajnigis, ke li konsterniĝas, — Tio estas alia. Tiam retro la tuton. Mi forgesis pri tio. De kvin jaroj, vi diras? Ne koleru . . .

— Ĉu ne, vi ne parolas serioze . . . Ve! Ne! Ho!

Nun jam ili mordis unu la alian. La knabeto brue frapis la pordon. La virino spasme skuiĝis.

— Lasu lin! — li kriis furioze. — Li nur frapadu. Poste li ĉesos.

— Kio do okazis al vi?

— Nenio, kredu, nenio. Ne batu tiun pordon! . . . Hodiaŭ estas dimanĉo, kaj mi okupiĝas pri mia familio. Ĉu tio ne estas en ordo?

— Sed alifoje . . .

— Diru, ĉu vi ne komprenas?

— Sed . . . Mi kredas. Vi, vi, mia dolĉa apaĉo . . . Venu nur, venu al mi.

Iliaj vundoj pulsis. Nun jam malrapide, kun pacienco ili amoris, ke ĉiu eta moviĝo havu sian signifon.

Li refreŝiĝis, kiel antaŭlonge.

— Rigardu nur — li diris poste. — Nu, jam eltenos tiu ĉi seĝo.

La virino rigardis la seĝon, kaj diris ankaŭ ŝi, ke ĝi nun jam tute certe eltenos.

Kiam ili ekkuŝis, ili sentis la friskon de la peplomo.

Estis tre bona tago. Bonega tago.

Tradukis: *Lajos Tárkony*

KIU ESTIS JULIO BAGHY?

En la ĉi-jara, 97a n-ro de Sennacieca Revuo *(p. 42—52) aperis studo de* Vilmos Benczik *sub la titolo* „Julio Baghy — la mitoj kaj la realo". *Nia redakcio trovis ĝin diskutinda kaj tiucele ĉi-sube ni resumas la ĉefajn konstatojn de la artikolo.*

La aŭtoro unue skizas la historion kaj la nunan staton de la Baghy-kritiko, asertante, ke — krom la eseo de Tárkony en De paĝo al paĝo, *laŭ li tro unuvidpunkta, — ne ekzistas serioze objektivintenca kritiko pri la Baghy-verkaro. Post mallonga konigo de la verkista kariero de Baghy li komencas sekci la idearon, kiu esprimiĝas en la Baghy-verkaro. Li konsideras ĝin specifa varianto de la etburĝa ideologio, konstatante, ke ĝi esence havas la samajn radikojn kiel la Zamenhofa homaranismo. Por pruvi ĉi tiun aserton la aŭtoro skizas la ĉefajn trajtojn de tiu etburĝa tavolo, en kiu Baghy edukiĝis. Lige kun tio li konstatas, ke rilate konkretajn politikajn problemojn Baghy ĉiam estis por la socia progreso, sed lia metafizika kontraŭperfortismo multe deprenas el la valoro de tiu apogo.*

Transirante al la estetika analizo la aŭtoro de la artikolo atentigas pri la neceso de la historia perceptmaniero. Sekcante la estetikajn kvalitojn de la verkaro li konstatas, ke aperas en ĝi multaj elementoj tipe amatoraj, tamen tiutempe ankaŭ estetike superaj kompare al la antaŭmilita literaturo. Precipe en la lirika verkaro la aŭtoro supozas vidi rolludadon. Li asertas, ke la ĉefmotivo de la verkaro — aperanta en ĉiuj periodoj — estas la „preter-komplekso": nome Baghy sentas sian forŝiriĝon disde la reala vivo, sentas la senefikecon kaj vivfremdecon de sia etika normaro, sed pro klasaj — konkrete sentimentaj — baroj ne kapablas rezigni pri ĝi, tial li sentas sin flugi „preter la vivo", suferante tiel pro konstanta konflikto.

Li akceptas la aserton de Tárkony rilate la ellaboritecon de la Baghy-verkoj, laŭ kiu Baghy pro sia temperamento ne havas paciencon al la metia flanko de la verkista laboro, tamen konstatas, ke kun la paso de la tempo estas videbla neneglektebla progreso tiukampe. La plejparton de la personaĵoj li trovas sensanga. Iom pli detale li analizas la konstruon de la verkoj en ĉiuj ĝenroj kaj trovas, ke Baghy preferis apliki ĉie draman aŭ almenaŭ dramecan konstrumanieron, kio ofte rezultigis banalan verkon. Ekzamenante la stilon de la verkaro la aŭtoro difinas ĝin — krom kelkaj esceptoj — romantisma-secesia-esprimisma. Certagrade kritikante la lingvan konservativismon li rigardas ĝin kiel utilan antipodon al la troa neologismemo de Literatura Mondo.

Taksante la tuton de la verkaro li trovas ĝian kulminon inter 1925 kaj 1933, la postajn verkojn — escepte la verkojn inter 1945 kaj 1949 — laŭ la aŭtoro dubvalorigas unuflanke la sinripeto, aliflanke la intensa evoluo de la Esperanta literaturo, kio malaltigis la relativan valoron de la nove kreitaj verkoj. La aŭtoro konsideras triaranga la tutan verkaron post 1950, inkluzive ankaŭ la dramon Sonĝe sub pomarbo.

Li agnoskas, ke la kultura-edukista kariero de Baghy estas unika en la historio de la movado, sed li supozas, ke ankaŭ la verkaro ŝuldas sian renomon al tiu kariero.

Provante trovi la literaturhistorian lokon de Baghy li aprezas, ke Baghy fakte kreis legantaron, kaj pro tio lia signifo por nia literaturo estas multe pli granda, ol estus laŭ la estetikaj kvalitoj de lia verkaro. Fine de la artikolo la aŭtoro pledas por la neniigo de la Baghy-mito kaj rekono de la nemultaj veraj valoraĵoj de la verkaro.

OPINIO DE SAMSORTANO

Mia kolego *Vilmos Benczik* verkis interesan studon (30 paĝojn en manuskripto) sub titolo „*Julio Baghy — la mitoj kaj la realo*".

Benczik skribas, ke „*Ankaŭ la novaj esperantistoj transprenis la senrezervan respekton kaj admiron al la Baghy-verkoj — ili kvazaŭ heredis ĝin de la malnova generacio.*" Li daŭrigas jene: „*estus naivaĵo kredi, ke la literatura kritiko faris ion por bremsi la fortiĝon de la falsa pritakso.*" Kaj ke *Krom la atentinda Tárkony-studo — precipe post la dua mondmilito — la kritiko ne kritikis, nur laŭdis liajn verkojn.*" Sed ankaŭ „la intima rondo de kleraj literaturistoj" ricevas riprocon de Benczik, kiu diras: „*En tiu medio oni ignoris la verkaron de Baghy, kiel tuton, kaj rekonas la valoron nur de kelkaj eroj bone faritaj. Tamen neniu el la ignorantoj havis la moralan kuraĝon diri sian opinion publike.*"

Benczik mencias ankaŭ Hungaran Vivon, kiu „protestis" pro sekva duonfrazo de Rytjkov; „Baghy ne estis granda poeto". Mi mem skribis en la n-ro de HV el 1968 pri tio, sed ne protestis, nur modeste diris la sekvajn: „Ĝis nun ni ne legis similan konstaton pri la poezio de nia forpasinta Baghy. Certe ankaŭ inter la poemoj de Baghy estas diferencoj laŭ enhavo kaj poezia valoro, krome: neniu asertis, ke la poezio de nia Baghy estas nesuperebla." Do per duonfrazo juĝi pri la literatura valoro de unu el niaj klasikuloj estas juĝo nepre nekonvena.

Nia hungara eseisto poste parolas pri la poemaro *Preter la vivo*, kaj li mem konstatas, ke „*Baghy kreis ion tute novan, la la freŝo, vervo de lia voĉo signifas literaturan revolucion, kiu proponas fortajn kolorojn anstataŭ la anemia grizo de la pli frua literaturo.*" Ĉiu devas konsenti pri tiu ĉi opinio.

Pri la dua poemaro de Baghy *(Pilgrimo) Benczik skribas, ke la poezia lingvo ĉi tie estas multe pli trafa, la aŭtoro plene regas la lingvon.* Interese, ke ankaŭ Drago Kralj (Kvar prelegoj, 1959) konstatis, ke „La enhavo de tiu poemaro estas patosoplena, abundas filozofiaj meditadoj kiuj en sonoraj kaj melodiriĉaj versoj ĉhas konvinke kaj varmmane. Sed li aldonas: „Tamen la tuto . . . ne emociigas nin tiel forte, kiel la unua poemaro; versoj en *Preter la vivo* venis rekte el dolora vundo iom cikatriĝinta . . ."

Benczik pravas, ke la nivelo de la lasta memstara poemaro de Baghy *La vagabondo kantas* postrestas al tiu de la antaŭaj poemaroj, sed laŭ mi ankaŭ en tiu ĉi volumeto troviĝas ĉarmaj, tre sukcesaj pecoj, ekz. „Verda stelo sur la brusto".

Kaj nun mi tute kontraŭdiras al Benczik, kiam li eksplikas, ke *Sonĝe sub pomarbo „kiel tuto havas malmultan literaturan valoron, ĉar ĝi esprimas malnovajn ideojn per malnova formo.*" Mi akceptas la opinion de Drago Kralj, kiu diras: „La pensoj esprimitaj en tiu ĉi verko, ĝia perla poezia konstruo, levas tiun versaron de Baghy en la vicon de tiaj kreaĵoj de nia litera-

turo, kiaj estas — post *Preter la vivo* kaj *Strečita kordo* — eble nur *Kvaropo* kaj *Kontralte*."

Kaj ĉi tie mi mencias, ke Benczik ne konvene taksas la valoron de la lasta kontribuaĵo de Baghy tiun de *Ĉielarko*, skribante pri ĝi, ke „ĝi estas plie ĉarma legaĵo, ol vera literaturo."

Ĉar mia cerbo kaj koro staras proksime al la ĉiutaga vivo, mi diras, ke ĉarma legaĵo meritas la klasifikon de „vera literaturo". Kaj oni devas emfazi, ke ankaŭ inter la dise aperintaj poemoj de Baghy, post la dua mondmilito troviĝas tre bonaj kaj belaj poemoj, ekz. la majstra poemo „Sklavokanto" laŭ enhavo kaj formo apartenas al la plej elstaraj poemoj de nia poezio.

Mi tute konsentas kun Benczik, kiam li akceptas la opinion de Tárkony kaj aliaj, asertintaj, ke en la romaneto *Printempo en la aŭtuno* „*koncentriĝis tiom de dolĉeco, ke ĝi fariĝis dika siropo*". Sed ankaŭ tie ĉi troviĝas alia flanko: tro multaj personoj tre ŝatas la siropon, kaj tiu ĉi romano fariĝis tre populara, estis tradukita al pluraj naciaj lingvoj. Ekz. en ĉina traduko aperis pli ol dek eldonoj.

Se nun ni transiras al la noveloj de Baghy, mi preskaŭ tute havas la saman opinion kiel Benzik, ke en la unua novelaro de Baghy *(Dancu . . .)* troviĝas du bonegaj: *Kiel Mihók instruas angle* kaj *Tri kamaradoj*, en la verko *Migranta plumo* estas la „majstra novelo" *Nigra kristnasko* kaj „ne malpli la realtona same emocia *Sinjoro Melonkapo; ankaŭ* en la postmilita novelaro *Koloroj* Benczik ellevas du: *Servo S. R. K.* kaj *Kancero de animo*. Mi supozas, ke nia eseisto ne eraris. Mi nur bedaŭras, ke Benczik subtaksas la valoron de la verko *Verdaj Donkiĥotoj*. Ĉi tie ni ne forgesu, ke ĉiuj ironiaj prozaĵoj kaj poemoj de Baghy havas ne nur estetikan valoron, sed ankaŭ praktikan, edukan kaj moralan, ĉar ili kvazaŭ en spegulo montras multajn strangaĵojn, eĉ ridindaĵojn de multaj esperantistoj. *Ili atentigas nin ĉiujn, ke ni ne estas sekto, sed multe pli grava afero.*

Laŭ mia scio Benczik estas la unua, kiu konscias pri tio, ke en la civila milito en Ruslando „la blankuloj estas nepre pli antipatiaj al Baghy, ol la ruĝuloj: multajn kruelaĵojn li prezentas, kiujn faris blankuloj, sed nur unu, kiun faris ruĝuloj". Honoron pro tio al Baghy, kiu kuraĝis ne nur instrui en la laboristaj grupoj, kaj konstante viziti ilin, sed montris la kruelecon de la ekstrem-orientaj blankuloj dum la hungara prefaŝisma periodo.

Baghy naskiĝis en aktora familio, ne estas do mirinde, ke Benczik ĝuste rimarkis lian „aktor-atitudon", kiu esprimiĝis ankaŭ en la rakontmaniero de liaj prozaĵoj, eĉ en diversaj poemoj.

Tárkony kaj aliaj verkistoj artikole kaj buŝe esprimis tiun interesan trajton de multaj Baghy-verkoj, ke „li ofte fuŝas bonajn temojn pro malforta, senzorga prilaboro". Benczik motivas tion per „la senpacienco" de la verkisto. Sed ĉu ni ne estas pli justaj, se ĉi tie ni aludus al la suferplena vivo de nia verkisto?

Benczik prave diras, ke Baghy „*tute ne estis blinda malamiko de la evoluigo de la lingvo: li uzas bildecan. esprimriĉan, elvokivan, vivan lingvaĵon, Vivan, kaj tio estis lia ĉefa atuto kontraŭ la neologismemuloj: li ne eksperimentis per la lingvo en laboratorio, li estis konstante inter diversnaciaj esperantistoj kaj vivis en la lingvo.*"

Kaj jen la finaj konstatoj de nia eseisto: „*Li aperis en decida historia momento kaj rekonis la pretendojn de la epoko, kaj per tio fariĝis — post Zamenhof — la dua fondinto de nia literaturo.*

Baghy signifis kaj ankoraŭ signifas eĉ nun necesan ŝtupon por la meze instruita homo sur la vojo de la konkero de pli altaj turoj de nia literaturo . . . Li do vere meritas nian respekton kaj amon, sed ni devas nepre detrui la falsan Baghy-idolon por anstataŭigi ĝin per statuo de la vera Baghy."

Mi supozas, ke la esprimo „dua fondinto" estas troigo, ja en la sama periodo ekagis ankaŭ aliaj gravaj literaturistoj. Kaj ankaŭ la vorton „idolo" mi ne jesas; se fakte ekzistus idolo, ankaŭ mi klopodus detrui ĝin; Baghy kiel *idolo* vivas maksimume ĉe kelkaj personoj, kaj tio ne estas danĝero.

Entute mi salutas la studon de Benczik (postulinta multe da studado) kaj mi tre ĝojas, ke ankaŭ mia kolego deziras la aperigon de kritika eldono de Plena Verkaro de Julio Baghy.

- *Ludoviko KÖKÉNY*

IDOLROMPO

— *Pensoj pri la literaturhistoria studo de Vilmos Benczik pri Julio Baghy* —

Julio Baghy estis vere eminenta homo, perfekta esperantisto, senduble talenta poeto. La Esperanto-literaturhistoriistoj — kiel ekzemple Drago Kralj kaj William Auld — konsideras lin la plej alta poeto de nia literaturo, kun kiu povas konkuri eble nur Kalocsay. Sed por esperantisto, parolanta la kluban Esperanton aŭ eĉ por la parolantoj de la kongresa Esperanto, Kalocsay estas malfacile komprenebla, do por ili la vera grandulo estas Pačjo.

Kaj jen venis „juna titano", talenta junulo rompi la adorendan idolon. Ho ve al li, kio okazos nun? Mi jam vidas la levitajn manojn kontraŭ lin.

Haltu! Mi konas aliajn faktojn. Verki studon pri Baghy, Vilmos Benczik decidis, kiam li ricevis leteron de iu el niaj plej altaj literaturistoj, kiu en sia letero skribas pri Julio Baghy, kiel pri pozanto, ne tutvalora artisto, kritikante la poeton tiel, kiel tiu jam ne meritas. La menciita literaturisto neniam publikis kaj publikos siajn opoziciajn pensojn, sed similajn voĉojn oni jam aŭdis kaj aŭdas en literaturemaj rondoj de Esperantujo.

El kio fontas la du kontraŭaj ideoj? Ambaŭ flankoj rigardas Baghy-n metafizike, nemarksiste, nescience. La senkritikaj laŭdantoj absolutigas la historian rolon de Baghy, la senlaŭdaj kritikantoj absolutigas liajn estetikajn mankojn. Kaj ambaŭ deŝiras lin kaj lian verkaron de la socia bazo.

Baghy verkis facile legeblajn verkojn, kiuj kompare al la plej granda parto de la antaŭa, amatora Esperanta literaturo estas pli literaturaj, sed ili estas amatoraj eĉ kompare al Kalocsay, se ne paroli jam pri la posta pli altinivela literaturo. La plej granda signifo de tiuj verkoj estis kaj estos, ke ili instruis legi Esperante la legantan parton de niaj samideanoj.

Jen la penso, kiu kristaliĝas en la vere valora studo de Vilmos Benczik. La plej grandan intereson de la studo mi vidas en tio, ke ĝi rigardas Baghy-n kaj lian verkaron sociaj fenomenoj, serĉas la socian humon de humanismo de la poeto, donas sciencan eksplikon al la problemoj de Baghy, ne ignorante ankaŭ individuajn kaj estetikajn trajtojn de la poeto. Ĝi faras ĉion ĉi surbaze de serioza studado de la tiutempa historio kaj de la verkoj mem.

La supre priskibrita metodo, per kiu Benczik analizas en la menciata studo kaj en aliaj studoj esperantistajn verkistojn kaj verkojn, estas vere scienca, dialektika metodo de la literaturhistorio.

Ĉi tiun metodon mi vidis ankoraŭ en neniu historio de la Esperantlingva literaturo, nek en studoj de aliaj Esperantaj literaturistoj. Anstataŭ la atako ni do konsideru Vilmoson Benczik, kiel la ĝis hodiaŭ solan marksistan historiiston de nia literaturo.

Péter RADOS

Kavaliro de la ordeno S-ta Olaf

HENRIKO HAJDU, hungara tradukisto en printempo ricevis grandan honorigon pro sia elstara laboro en la popularigo de la skandinava literaturo. La nuna grandmajstro de la ordeno, la norvega reĝo Olaf la 5a, distingis lin per la medalo de la ordeno S-ta Olaf. Henriko Hajdu komencis aperigi antaŭ 60 jaroj siajn tradukaĵojn el la skandinava literaturo (Ibsen, Pontoppidan, Undset, Anersen-Nexö ktp.) — ĝis nun 101 volumojn. Inter ili estas la tuta Ibsen-eldonaĵo (nur 3 da ili troviĝas entute en la mondo!). Pere de lia fidela traduko kun mirinda stilo nia generacio en Hungario povas bone konatiĝi kun la skandinava literaturo. Henriko Hajdu mortis la 2-an de junio 1969.

PANORAMO

La plej modernajn instrumentojn

sendas la hungara industrio kaj komerco por la Brazilaj mez- kaj altlernejoj. Pasintjare en iu internacia konkurso Brazilo donis komision al la hungara komerco kun eksterlando pri liverado de maŝinoj, elektraj kaj elektronikaj laboratoriaj instrumentoj — kontinue ĝis 1970 — sume en valoro de 10 milionoj da dolaroj.

Mondfama orientalisto

LUDOVIKO LIGETI, la vicprezidanto de la Hungara Scienca Akademio ricevis la oran medalon de „Indiana University Price for Altaic Studies" (La premio de la Indiana Universitato por studoj pri la Altajaj lingvoj). Akademiano Ligeti aktive esploras jam de 1928 la orientajn lingvojn, li faris vojaĝojn en Mongolio, Manĉurio, Afganio, Japanio. Li aperigis valorajn verkojn pri siaj esplor-rezultoj, ekz. pri la mongoldevenaj vortoj en la hungara lingvo, pri la mongola kaj turka lingvoj en Afganio ktp. Liaj popular-sciencaj verkoj pri Azio estas konataj kaj utilaj hejmlande kaj eksterlande.

En Nova Biala

apud Zakopane en Pollando oni trovis valoran historian dokumenton pri la hungara-pola interrilato: la akton pri la fondo de tiu ĉi loksidejo, kiun akton donis la hungara reĝo Béla (Adalberto) la 4a antaŭ 700 jaroj. La latinlingva dokumento enhavas la rajtojn de la loĝantoj de Nowa Biala (hungare: Uj Béla = Nova Adalberto). La dokumento (el la 13a jc.) montras, ke la hungara reĝo, kiu fondis la loksidejon kaj donis al ĝi nomon kaj rajtojn, klopodis fari konfederacion kun la najbaraj popoloj. Li estis energia kaj reale saĝa regnestro, kiu defendis la ekzistadon de la hungara ŝtato kontraŭ la tiama tatara danĝero.

Fromaĝ-fabriko estiĝas

en la Libana Enfah laŭ plano de hungaraj fakuloj. Ankaŭ la produktado okazos helpe de krudmaterialo liverota el Hungario. Ĝi estas komuna fabriko de la Bejruta entrepreno Amine Aour kaj la hungaraj entreprenoj Terimpex kaj Laktindustria Trusto. Ankaŭ la estraranoj estos hungaraj kaj Libanaj fakuloj.



◀ (Fotis: Vittorio Canavero, Torino)

Propran pediatron por ĉiu infano!

Ekde la pasinta jaro en Budapeŝto (kaj ĝenerale tutlande) ĉiu infano havas sian propran kuraciston. Laŭ la nova sistemo de la sanitara servo la infanoj rajtas pretendi sanprizorgadon ne nur en la distrikta dispensario, sed ankaŭ la distrikta pediatro kaj infan-prizorgistino regule vizitas ilin en ilia hejmo. Kiam la infano naskiĝis, la kuracisto faras viziton por „prezenti sin", kaj post la interkonatiĝo li regule (semajne aŭ monate) vizitas la infanon. Ankaŭ tiam, se la infano estas sana, — ĉar la regula vizitado helpas preventi la malsanon. Neniam en la hungara historio estis tia ebleco por infanoj (ĝis aĝo de 14 jaroj), ke ili havu — ĉiuj kaj senpage — la propran „hejman" kuraciston!

Malplena cikonio-nesto

sur la fumtubo de la ĉardo de Hortobágy. La karakteriza birdo de la hungara ebenaĵo aŭtune forlasas la landon por viziti Sud-Afrikon, kaj revenas en printempo. Sed . . . en la lastaj jaroj ĉiam malpli da ili reflugis al la forlasitaj nestoj. La ornitologistoj serĉas la kaŭzon — ni esperas, ke la ebenaĵaj domoj kaj tiu ĉardo kun la centjara (!) nesto povos ĝoje saluti printempe denove la ŝatatajn loĝantojn, la karajn cikoniojn.

PANORAMO

Nur 18 jara estis Maria IVÁNKA, kiam ŝi atingis la rangon „internacia majstro" de la ŝako. Dufoje ŝi fariĝis la hungara virina ĉampiono ▶



(Fotis: Karlo Hemző, Budapest)

Aŭstra-hungara kooperado

en la produktado de la artefarita fadeno „akril". La entreprenoj Österreichische Stickstoffwerke (Aŭstrio) kaj la hungaraj Viscosa, Hungarotex kaj Chemolimpex subskribis kontrakton pri kooperado: la aŭstra fabriko sendos krudmaterialon, la hungara industrio, prilaborinte ĝin, resendos la pretan fadenon. Tiu ĉi kunlaborado igos la produktadon — reciproke — pli malmultekosta, kio favore influos la utiligon de la fadeno „akril".

Nova medikamento kontraŭ glaŭkomo

En la hospitalo János en Budapeŝto la kuracistoj elprovis novan hungaran medikamenton, la „stabilan 1%-an Adrenalin-kolirion" kun bona rezulto. Tiu kolirio tenas la internan tension de la okulo en normala grado, per kio ĝi malhelpas la pliiĝon de la tensio, kiu kaŭzas la malmoliĝon de la okulo, sekve — la glaŭkomon. Tiu ĉi nova Adrenalin ne havas flankan efikon, — ekz. doloro — la malsanuloj kaj la fakuloj esperas en ĝi la plej efikan kuracilon kontraŭ la glaŭkomo.

Hungaraj trejnistoj

vojaĝis al Alĝerio por eduki la junajn sportistojn. Kvin fakuloj dum du jaroj trejnos la plej talentajn Alĝeriajn junulojn, helpos ilian evoluon en la sportobranĉoj naĝo, skermo, akvopilkado, teniso kaj atletiko.

La plenum-komitato

de la Internacia Klubo havis plej lastan kunsidon en Londono, kaj dum la konsiliĝo la poeton Gyula Illyés oni elektis unuanime la vicprezidanto de la mondskala verkista organizaĵo. Estas la unua fojo, ke hungara verkisto venis en tian oficon en la Internacia Klubo Pen.

La historia demografio

estas nova branĉo de la naskiĝ-statistiko, per kies metodoj oni povas konstati: kiom nombra estis la homaro ekz. en la jaro 1800 aŭ 1900, eĉ en iu ajn epoko en la historio. La demografiistoj kaj la biologiistoj utiligas tiun sciencon por ekkoni la ŝanĝojn de la nombro — kvantojn pri la naskiĝoj kaj mortoj — de la homaro. El la ricevitaj indikoj ili ellaboras la taskojn de la san-prizorgado kaj sanitara servo en nia epoko. Ĉi-jare, en aŭtuno okazos konferenco en Londono, kie prelegos ankaŭ la hungara profesoro Jozefo Kovacsics pri la „Homkvanto de la mondo post 1800."

Ĉi-jare

oni aranĝis la ekspoziciojn de du mondfamaj hungardevenaj artistoj de la figuraj artoj. La hungara Instituto por Kulturaj Interrilatoj prezentis la skulpt-artiston Amerigo Tot, vivantan en Romo, kaj poste la pentroartiston Victor Vasarelly per elektita materialo el lia dumviva laborado.

EN-KAJ EKSTERLANDE

ĉiam kun granda sukceso rolas la Arta Ensemblo de la Hungara Popolarmeo. Antaŭ 20 jaroj estiĝis la orkestro, ĥoro kaj dancistaro de la Ensemblo, por ke ili servu la kulturan edukadon kaj amuziĝon de la soldatoj. Dum tiu tempo la Ensemblo ne nur bonege plenumis tiun taskon, sed el ĝiaj anoj multaj estiĝis famaj artistoj de la hungaraj teatroj, eĉ, la Ensemblo donis ankaŭ mondkonatajn operkantistojn . . . La artaj grupoj ofte rolas ankaŭ en eksterlando, ĉi-jare ekz. en Francujo kaj en arabaj landoj. ▶

Muzika vivo en Hungario en printempo de 1919

Printempo de la jaro 1919 estis en Hungario la printempo de la nacio: finiĝis la unua ĝis tiam plej granda mondmilito, kaj komenciĝis nova historia epoko.

Ankaŭ la hungaraj muzikistoj tre aktive kroĉiĝis al la nova socia movado. La grandajn komponistojn kaj sciencistojn Béla Bartók kaj Zoltán Kodály tuŝis la vento de la naskiĝanta nova mondo: ankaŭ ili estis tie, kie oni devis agi por la nacio kaj mondkulturo.

La proklamo de la Konsilantar-Respubliko alportis gravajn rezultojn por la muzika vivo de Hungario. Jen unu el ili: la plej karakterizaj muzikaj tendencoj de la tiama epoko ricevis pli gravan rolon en la socia vivo, ol antaŭe; ili estis pli forte apogataj fare de la oficialaj rondoj, ol iam ajn.

Tre grave estis, ke *Béla Reinitz* atingis grandan influon en la direktado de la muzika politiko de Hungario. Reinitz estis entuziasma adepto de la arto de Béla Bartók kaj de la moderna muziko. La membroj de la registaro de la Hungara Konsilantar-Respubliko fidis al la arta juĝkapablo de Reinitz, kiu mem estis komponisto kaj muzikigis multajn poemojn de la granda hungara poeto, Endre Ady.

La plej unua ago de Reinitz estis la protektado de la modernaj hungaraj komponistoj. Antaŭ ĉiuj li subtenis *Béla Bartók;* li klopodis havigi al Bartók eblojn por ke li povu realigi siajn planojn kaj ideojn. Bartók havis tre originalajn kaj valorajn pensojn pri la disvastigo de la vera muzika kulturo, pri kiuj ni povas bone informiĝi per liaj leteroj. Sendube tiam ekestis la granda amikeco inter la du komponistoj, kiu daŭris dum la tuta vivo.

La Konsilantar-Respubliko en Hungario daŭris nur 133 tagojn. Tamen en ĉi tiu mallonga tempo prepariĝis fundamentaj reformoj en la muzikkulturo de Hungario.

El la letero de Bartók (la 9-an de junio 1919), ni ekscias, ke la registaro intencis fondi *muzikan muzeon* kun aparta folklora parto. Estis laborantaj en ĝi *László Lajtha*, la edzino de Béla Bartók kaj kelkaj aliaj oficistoj. La gvidanto de la folklora klaso estus estinta memkompreneble Béla Bartók.

Antaŭ ol oni proklamis la Konsilantar-Respublikon, la 19-an de februaro 1919, la ministra konsilantaro donis novan nomon al la tiama „Muzikakademio"; *Landa Hungara Muzika Altlernejo*. La profesoroj de tiu institucio ricevis la saman rangon kaj salajron, kiel la universitataj profesoroj. Tiatempe fariĝis profesoro *Imre Waldbauer*, la gvidanto de la posta mondfama arĉkvarteta ensemblo.

En aprilo 1919 la registaro nomis gvidantoj de la Altlernejo trimembran direktorion; la membroj estis Béla Bartók, Ernő Dohnányi kaj Zoltán Kodály.

Modernan ideon realigis la Konsilantar-Respubliko, kiam ĝi ne limigis la lernadon kaj instruadon de la muziko je la gejunuloj kaj infanoj.

Menciinde estas, ke Béla Bartók mem deklaris la neceson de la disvastigo de la muzikinstruado. Li diris tiam inter aliaj: „Ĉe ni multaj talentoj kaŝas sin inter la infanoj de malriĉuloj, kiuj estas por eterne kaŝitaj pro la manko de la lernado kaj scio. La helpon povas doni sole la reformo de la kantoinstruado en la popolaj lernejoj. En la popolaj lernejoj dum tri jaroj devus esti deviga la instruado de kantado, kiu enhavus la legadon de la muziknotoj kaj la instruadon de la notoskribo de simplaj melodioj. Memkompreneble estus necese dungi unuarangajn pedagogojn en la popolaj lernejoj kaj klerigi ilin per speciala metodo, taŭga por ĉi tiu celo. En la unua tempo oni devus ĉi tion enkonduki almenaŭ en la urboj."

La registaro realigis la proponon. La dekreto de la 14-a de aprilo 1919 de la Budapeŝta Laborista kaj Soldata Konsilantaro ordonis jene: „Por ebligi la disvastigon de la muzika kuturo en vastaj rondoj, ni alvokas la gvidantojn de la nomitaj lernejoj: registri urĝe tiujn proletinfanojn, kiuj intencas aliĝi al iu muzika kurso. Sciigu la nombron de la aliĝintaj lernantoj al la Komisariato por la Publika Edukado, por ke ni povu kiel eble plej rapide fari ĉion necesan por fondo de la novaj kursoj. La muzikinstruado estas senpaga."

Tre interesa legaĵo estas la „Raporto de la Popola Komisariato por la Publika Edukado", eldonita en junio 1919.

La raporto plej unue konstatas, ke la disvastiĝo de la diletantismo estas la sekvo de *la erara metodo de la arta edukado.*

Inter la 21-a de majo kaj fino de junio 1919, 56 prezentadoj estis aranĝitaj kun muzika kaj literatura enhavo en Budapeŝto. La nombro de la aŭskultantaro estis pli ol 40.000. La koncertoj estis en ĉiu okazo enkondukitaj per interesaj klarigoj. La Raporto mencias: „Ni prezentis riĉan programon de la klasikuloj de la muziko al la kamaradoj kaj faris la verkojn pli kompreneblaj per klarigaj prelegoj."

La Hungara Muzikista Asocio eldiris, ke ĉiu koncerto enhavu almenaŭ unu verkon de hungara vivanta komponisto.

Jen mi menciis kelkajn indikojn el la muzika politiko de la Konsilantar-Respubliko de Hungario. Multaj el ili realiĝis nur post la dua mondmilito. Kaj ni devas konstati, ke la laboro de la mondfamaj kaj entuziasmaj antaŭuloj ne estis vana — ties fruktoj pliriĉigas la hodiaŭan mondfaman muzikkulturon de Hungario.

Ĉiu arta kaj muzika rezulto de la Hodiaŭo estas, almenaŭ parte, la rezulto de la klopodoj de hungaraj humanistaj muzikistoj antaŭ 50 jaroj.

Lajos LESZNAI

GASTA PAĜO

SONETO

Muziko nun, dum multaj kordoj mutas
kaj oni hontas pri la melodio
aŭ grumblas sian naŭzon? Jes! Liutas
hodiaŭ mia korpo. Se defio
necesas, jen senplue ĝi en la dentojn
de kore-kape doloranta mondo,
cinike forcedinta siajn sentojn
pri ĉio ekster sia laca rondo.
La belo estas pli ol ni, ol nun,
ne rifuzebla. Kiam agnoskata,
ĝi estas la radioj de la sun'
lumantaj nian tagon. Vivmalsata,
la hom' ĝin trovas malgraŭ ĉia turmento,
ĝin prijubilas aŭ vartas en silento.

EDWIN DE KOCK

(1930-) estas Sudafrika poeto, kiu scias el la griza sablo de la ĉiutagoj ellavi strange sed alloge facetitajn juveletojn de pensoj kaj bildoj. Lian poezion tamen ombras ia prema etoso fontanta certe el lia homaranismo (vd. la poemon Sud-Afriko*). Pasiulo de originalaĵoj, li verkis eĉ sangvinan poemon kontraŭ la tradukistoj, kies produktoj gustas laŭ li plej ofte kiel „mensa ricinoleo". (Tamen, tradukado estas plej bona memperfektigo: lernante esprimi striktforme alies mondon, oni lernas adekvate esprimi sin mem). Politike la poeto estas bonintenca naivulo konklude el la malmulto politika, kiu enŝteliĝis en liajn poemojn.*

Li dissendis 36 poemojn al pluraj adresoj. Du poemojn mi prenis el tiuj, la aliajn du ni elektis el lia poemaro „Fajro sur mia lango" aperinta ĉe STAFETO de Régulo Pérez.

K. K.

VEKITE

Mi pensis, ke mi aŭdas bebon plori
de ie en la nokto, sed ekstere
vidis nur lunon plumbostanan sori
lante, neperturbeble, dum mistere
etendis sin branĉombroj kaj la kampoj.
La gril' aŭskultis. Roso kaj silento
heredis ĉion post la lastaj lampoj
laŭ suverena dormotestamento.
Du molaj gekunikloj sonĝis kune
en kaĝo, kaj sur amŝirmata ovo
patriniĝanta kolombino. Nune
briletas blanke kalmo kaj senmovo
Sed dorme mi ja aŭdis (kaj memoras),
ke ie terurita bebo ploras.

NOKTURNO

En la pluvsusuro tra folioj
la singultoj de la nokto sonas,
kaj duone sufokitaj krioj,
kiujn la antikva mondo konas.

Sulkas sola inter sombraj montoj
la rivero sian larmŝoseon,
kvazaŭ el pasintaj homrakontoj
ĝi murmurus la senbuŝan veon.

Sub la altaj seriozaj steloj
la minutoj al malhela foro,
preter pluvo kaj foliopeloj,
marŝas, marŝas el la kava koro.

SUD-AFRIKO

Tage nubskrapaĵoj, kiel fungoj
de l'epok', reklamas siluete
sian okcidentecon, dum la ungoj
de la nokto restas inge, prete.
Sed kiam vespero ĉe Kapurbo
ruĝpiede marŝas en la ondojn
kaj dronas, kie foje la perturbo
de blankulaj ŝipoj importis mondojn
fremdajn post vizaĝoj norde palaj,
tiam reposedas ĝi la landon.
Vente iras muĝoj prabubalaj,
kaj la timo plantas sian plandon
ĉe la koro, kiam Io venas
trans la stepojn ĝis l'unuaj domoj,
kaj sin pezaspire nur fortrenas
frumatene, kun la frostfantomoj.
Sur la kontinenta nigra sino
pezas ŝarĝ' de konscienco kaj destino.

Manĝante en Hungario

Du renomaj poetoj hispanlingvaj, la Nobel-premiito Miguel Angel Asturias kaj la Lenin-pac-premiito Pablo Neruda, post sia vizito al Hungario verkis gaje entuziasman libron, titolitan „Comiendo en Hungaria" (Manĝanta en Hungario). El tiu libro, kiu kun gargantueska vivoĝojo gloras la plezuron de la ĝuitaj manĝadoj kaj trinkadoj, ni donas kelkajn fragmentojn kun la komentoj, kiuj ŝajnis necesaj. Eventuale ni ĉerpos ankoraŭ el ĝi por niaj pluaj numeroj.

Miguel Angel Asturias

La supo reakiras siajn rajtojn

Kiu povus diri, kial do oni rompis siajn infanaĝajn ĵurojn neniam manĝi supon, kaj komencis ĝin fine kulerumi? Ĉu el bezono aŭ el plezuro? Certo estas nur, ke la iama infano, tiom protestanta mane-piede kontraŭ la supo, foje, en Parizo, jam kiel junulo, iun belan tagon komencis flaradi: bonodora vaporo flirtis el la senorela taso ĝisrande plena de ceposupo.

Ho, ho, sed nur ĉi tiun solan! . . . li decidis obstine. Tamen glitis al li malsupren ankaŭ novaj supoj . . . la supoj de la Parizaj hungaraj restoracioj, kaj inter ili la fama gulaŝo.

En la ĉiela hierarkio ĉi tiuj du supoj apartenas al la sfero de la arkanĝeloj. Ili dominas. Ili komandas.

Kiu volas penetri en la mondon de ĉi tiuj supoj, tiu sekvu la spurojn de la homo, kiu, timante ke li mortos de soifo, serĉis fluidaĵon, kaj kiam li ĝin trovis, ekideis al li, ke li eble mortos ja de malsato, kaj li jam kuregis al la solida manĝaĵo, sed veninte tien, haltis hezite, ĉar eĉ se vere, ke per tiu ĝi povas estingi sian malsaton, sed la teruro de la soifmorto lin ankoraŭ plu minacas. Naskiĝis decido Salomona, mikso de fluido kaj solido, samtempe manĝebla kaj trinkebla.

La kokinsupo de Ujházi! Mi devis veni Hungarion por ekscii, kia ĝi estas, por ĝin gustumi. Por mi, Hungario estas la lando de la supoj. Tremu, kartilagoj, timtremu meningoj! Spiritoj de la kolesterino! . . . Po unu koko por unu kapo. Unu koko kune kun spronoj, kresto, kun la tuta kokumado, kiom ĝi povas enteni. Sed mi ne donos recepton. Kial ne? Ĉar unu recepto sekvas la alian. Kaj jam tretas nian kalkanon la fiŝosupoj. La koncentraj-aromaj. La plej koncentraj-aromaj fiŝosupoj Balatonaj. Aŭ la restoracioj specialiĝintaj por ĉasviando. En ĉi tio Budapeŝto marŝas plej antaŭe. Aprosupo, leporpecetara supo, viando-kneletoj el haketita cervoviando, frititaj kroket-maniere, en ruĝa vino.

Ni klinas nin antaŭ la bona gusto kaj konas ankaŭ alian guston, ekzemple la francan supon potiron, *sed ni devas konfesi, ke la hungara kukurbaĵo estas pli delikata. Ĝin distingas disde la* potiron, *ke ĝi enhavas ankaŭ etan spicon, aneton, kaj acidetan laktokremon, kiu tiel arome bongustigas multajn hungarajn manĝaĵojn.*

Kaj se jam pikas niajn lipojn la supo, por mencii, ni notu ankaŭ la eltrovaĵon de la hungara kuirejo, la fruktosupojn. Oni pladas ilin malvarmaj. Plej bona estas la griota supo, dolĉeta kaj pale rozea, kvazaŭ supo el rozoj.

Ankoraŭ unu perlosupo, la tarhona supo, praa nutraĵo; la tarhono estas el la familio de la italaj nudeloj. Kiu scias, eble ĝuste Marco Polo . . .

Supo kaj vino — ni gustumis ankaŭ la aprosupon kun rozberoj. Kia surpriza miksaĵo! Hungario estis landvojo, ĉio originala, ĉio surpriza fariĝis organika parto de ĝia vivelemento, vivoĝojo.

Kaj en la supoj ĉiam troviĝas la ingredienco donanta ilian guston hungareskan: la papriko.

Pablo Neruda

La granda pokalo

Mi levas la pokalon grandan, pokalon de jarcentoj, verŝas ĝin plena per hungara sunlumo kaj trinkas la brilantan vinon. Mi verŝas ĝin plena per forta malhela taŭrosango,[1] per la retiana[2] de Csengőd, per la kadarka[3] de Kiskőrös, kaj brilas la pokalo altenlevita, gardas la guston sunbanitan, kaj en la lumo de tago ŝirmiĝas la potenca malhela vino, sekreto de stelaj noktoj. Ni trinku kun ĝia fajro la tagon, kun ĝia sango la nokton. Ni trinku la brulajn, impetajn vinojn de la Granda Ebeno, la moskatelon de la Ora Sablo,[4] la bluafrankan de Sopron, la tilifolian[5] de Debrő.

Militoj kaj konkerantoj trapasis la landvojojn de Eŭropo, sed ankaŭ spicoj kaj aromoj. Ĉiom da ili restis ĉi tie en la hungara kuirejo; en la nomadaj potoj kaj kaseroloj miksiĝis la zingibro kaj papriko, la kumino kaj ajlo: fajrerantaj konstelacioj de gustoj kriegis vokante vin-riveregojn, ke ĉi tiuj ilin kunlavu mikse. Hungaraj manoj plantis, markotis la vitotrunkojn en la hungara tero, ĝis ili povis doni al la premilo la dolĉan impetan koron de la stepaj vinberoj, la ferocan sukon de la montaj traŭboj, nigraburgonjeskan, kadarka de Pusztamérges,[6] grizan monakon,[7] blua-tigan,[8] medokeskon de Villány, furminton[9] de Tokaj, sekbervinon kaj samorodnion,[10] diafanan kaj ridetantan, dolĉan aŭ ŝveban. Ili estas ĉiuj festaj fajroj, vivplilongigaj kiel tiu de Somló,[11] vekantaj kanton kaj ĝojon. Ĉar el ili ĉiuj verŝiĝis suko en nian pokalon. Tiuj vinoj ploras aŭ ridas samritme kun via animo. La vinoj oldvinjetaj, kronitaj per nimbo tiel same, kiel la simplaj sennomaj vinoj de la kamparo, vinoj sudaj kaj vesperkrepuskaj, vinoj kiuj nur nokte flamigas por kanto. Vinoj naskiĝantaj kune kun la spikoj de la rikoltistoj, vinoj novaspecaj, kiujn ĵustempe estigis la fiero de la kooperativoj, oldaj vinoj grandsinjoraj, junaj vinoj pasie danĝeraj, vinoj konvenaj al unu sola ŧrista minuto aŭ al ĉia revo sammaniere.

Mi levas mian pokalon plenan de fulmanta brilego de Hungarlando, mi trinkas je la sunlumo kaj ties neĝfajreroj, je la tristo kaj ĝojo, je la amo kaj doloro, mi trinkas je la fajro kaj pluvo.

[1] *Taŭrosango.* Granatkolora ruĝa vino de Eger.

[2] *Retiana.* Vino de uvo devenanta el Retio, samdevena kun la Rejna *Riessling* (Riess = Retio). Ĝi nomiĝas hungare rizling. Ekzistas forta Rejna rizlingo kaj leĝera (itala) rizlingo. *Csengőd* pron. Ĉengöd.

[3] *Kadarka.* Rozkolora vino, el uvo devenanta eble el Skutari, (skutara/kudara/kadara/kadarka). *Kiskörös* pron. Kiŝkörőŝ.

[4] *Moskatelo* = muskatvino. *Ora Sablo* estas nomata hodiaŭ la sabla regiono inter Danubo kaj Tibisko (Tisza). En la pasinta járcento ĝi estis senfrukta dezerta regiono de kuranta sablo, nun fekunda tero de fruktarboj, noblaj vinoj, bonegaj legomoj.

[5] *Tilifolia.* Dolĉeta, interes-aroma, „medola" vino. Jam antaŭ mil jaroj ĝia uvo kreskis en Hungario.

[6] *Kadarka.* Vd. sub 3) *Pusztamérges* pron. Pustamergeŝ.

[7] *Griza monako.* Ĝia nomo devenas el la franca *pineau (pinot) gris* kaj ĝia uvo mem estas francdevena, sed sur la monto Badacsony (Badaĉonj), kie ĝi kreskas, sur la vulkana grundo kaj en sunluma klimato ĝi fariĝis „fajra", „medola", forta, eminenta vino.

[8] *Blua-tiga.* Forta vino de Badacsony.

[9] *Furminto,* La uvon portis en la landon vallonoj en la XIII. jc. Ĝi nomiĝis origine *froment*-vino, laŭ ĝia tritikeska koloro *(froment* malnovfrance = tritiko).

[10] *Sekbervino* kaj *samorodnio.* La *sekbervino* aŭ *asuo* (hungare: *aszu*) estas la plej nobla vino de Tokaj. En la longa sunluma aŭtuno oni longe lasas la uvojn sur la trunko kaj tiam je la efiko de nobla ŝimfungo tiuj ŝrumpsekiĝas: la acido en ili malpliiĝas, la sukero plimultiĝas. El la zorge elektitaj beroj oni faras „asupaston", kaj ĉi tiun surverŝas per mosto aŭ per nova vino. Laŭ tio, kiom da dorskorboj el la „asupasto" oni donas en barelon de 134 litroj, oni distingas asuon 1—4 dorskorbajn. La Tokaja asuo tre malrapide (en 4—8 jaroj) maturiĝas, sed eltenas tre longan tempon, eĉ jarcentojn. Unu el la plej fajnaromaj, plej harmoniaj, fajnaj desert-vinoj de la mondo. La *samorodnio* pretiĝas tiel, ke la traŭbojn oni elpremas tiaj, kiel ili maturiĝis, do ŝrumpsekajn kaj nesekajn berojn kune; tio klarigas ĝian pol-devenan nomon: *samorodni* = tia, kiel ĝi kresis. Tial, kompreneble, la kvaliton de la vino tre influas la vetero: se estis pli da sunlumo, la vino estas dolĉeta, se estis malpli da ĝi, la vino estas seka.

[11] *Somló* (pron.: Ŝomlo). Sur la deklivoj de la monto Somló etendiĝas pramalnova vinregiono, kiu kvankam nur 300-hektara, donas unu el la plej rimarkindaj „historiaj" vinoj hungaraj. Laŭ la tradicio, se ĝin trinkas junaj geedzoj, naskiĝos al ili filo. Tial en la Habsburg-dinastio estis neskribita leĝo, ke antaŭ nuptonokto la juna paro devas trinki vinon de Somló.

Tradukis: *K. KALOCSAY*

HUNGARA VIVO

Aperas jare 4 × 4 000 ekzempleroj
spegulmezuro: 172 × 240 mm kolumnoj 54 mm

Oficiala revuo de la hungara Esperanto-movado. Ĝi enhavas beletristikon, novelojn, poemojn, ktp. — artikolojn pri problemoj de la hungara Esperanto-movado kaj skribaĵojn prezentantajn la vivon de Hungara Popolrespubliko kaj de la hungara popolo.

anoncprezo 1/1 paĝo: $ 120,— DM. 480,—

HUNGEXPO **(reklamagentejo) Budapest 70 POB, 44**

Pensoj pri la internacia lingvo

MÓR KORACH, ano de la Hungara Scienca Akademio

La neceseco de internacia lingvo estas — miaopinie — jam tiel evidenta kaj urĝa, ke preskaŭ mi sentas banala diskuti pri tio. Ne ekzistas inter la homoj muro pli malfacile detruebla, ol kiun levas — kvankam nevideble, sed tiom pli masivan — la reciproka lingva nekompreno inter la malsamlingvajn homgrupojn. Estas mia vivosperto, ke la pli intima interkonatiĝo — kies elementa antaŭkondiĉo estas la reciproka lingva kompreno — preskaŭ ĉiam forigas la malkonfidon, la fremdecon, kiun homo lingve nekomprenebla kvazaŭ instinkte emanas. Dum miaj vojaĝoj nekalkuleblajn fojojn mi spertis, ke okaze de renkonto inter du homoj kiel rapide degelas la sinreteno, se post pli da eksperimentoj ili trovas komunan lingvon.

En internaciaj organoj, kiel ekz. en la Organizo de la Unuiĝintaj Nacioj, en internaciaj aŭ aliaj kulturaj kunvenoj oni provas helpi per interpretistoj. Mi definitive konvinkiĝis pri tio, ke la interpretisto tre ofte disigas la interpretatojn almenaŭ tiomgrade, kiom li kunligas ilin, ĉar ĉiam estas donita la ebleco pri erara traduko, kio sekvigas suspektadon kaj dubadon. Helpi pri tio ne estas eble krom per mondskala enkonduko de la deviga instruado de E. en la elementajn lernejojn.

Tiu ĉi pedagogia interveno jam komencas fariĝi minace urĝiga, ĉar tiel mi vidas, ke la eksterordinare disvastiĝinta internacia turismo disvolvis inter la diversaj popoloj en pli granda mezuro senton de fremdeco ol interkomprenon, ĝuste pro la indikitaj konversaciaj malfacilaĵoj. Mi konsideras Esperanton kiel unikan rimedon kapablan larĝe malfermi la pordon de la reciproka interamikiĝo.

Kio estas farebla interese de ĉi tio? Estas konate, ke UEA direktis peticion al OUN pri la enkonduko de E. kiel dua lingvo en la lernejojn de ĉiuj landoj. Ankaŭ mi mem persone sugestis tion al U-Thant, ĉefsekreterio de OUN. Miascie tiuj sugestoj forsonis senefike. Mi kvazaŭ havas la impreson, ke eĉ en la medio de la intelektuloj subkonsciaj obstrukcoj malhelpas, ke plifaciliĝu la proksimiĝo al niaj homfratoj. Ne-malofte min ŝokis tiaspecaj malinklinoj kontraŭ E., kiam temis pri ĝia enkonduko.

Sekve, ni devas kalkuli pri tio, ke ene de mallonga tempo ne estos atendebla favora evoluo ĉi-koncerne. Bedaŭrinde ankaŭ la spertoj de la socialismaj landoj pruvas, ke estas multe pli malfacile kaj malrapide transformi la pensad-manieron de la homoj, kaj ĉesigi iliajn instinktajn antaŭjuĝojn, ol akceptigi per ili organizajn aŭ teknikajn novigojn. Mi povas sugesti nur, ke ĉiu Esp. Asocio zorgeme studu la psikologian fonon de la menciita problemo, en siaj revuoj kaj publikaĵoj ili direktu la reflektorojn de la koniĝo al tiuj mallumaj animaj sub-teretaĝoj, kaj sisteme ili studu — por tiel diri — la „kulturan pedagogion" de la demando.

Tamen mi pensas, ke ĉiujn ĝis nun aplikitajn rimedojn por la popularigo de la mondlingvo ankaŭ plu oni devas eluzi. Inter ili la plej efika mi opinias ĝian aplikadon ĝuste en la praktiko koneksa kun la turismo. Estas konate, ke la alilingvaj popolgrupoj kiel malfacile povas lingve kunfandiĝi kun la popolo ilin ĉirkaŭanta. Sed estas konata ankaŭ tio, ke certaj sintetikaj „mondlingvoj" kun praktika signifo, kiel ekz. la signaloj de la aŭtotrafiko, rapide, preskaŭ sen kontraŭstaro disvastiĝis sur la tuta Tero. Se ajnmaniere, laŭ la sama percepto kaj per similaj rimedoj, en mallonga, simpla, preskaŭ skema formo ni povus lanĉi ĝin, kiel la ilon de informado de la turismo, al la tutmonda cirkulado de la homoj, eble tio jam ne tuŝus tiujn sentemajn psikologiajn obstrukco-punktojn, kiuj kontraŭstaras, konsiderante Esperanton — evidente erare — lingvo volanta anstataŭi ĉiujn vivantajn lingvojn. Se ĉiu turist-agentejo enmanigus al ĉiu vojaĝanto mallongan E-an gramatikon, malgrandan kunmetaĵon de konversacio kun la plej necesaj fremdultrafikaj demandoj kaj respondoj kaj fine bone redaktitan vortar-ekstrakton, kaj se en ĉiu turisma centro, en ĉiu motelo, en ĉiu stacio de aŭtoservo ktp. troviĝus iu, kiu parolas E-on, kaj faras la koneksan priturisman laboron, tio eventuale grave kontribuus al la afero de Esperanto.

DOMFABRIKO

Kiel ni promesis, jen ni publikigas la duan dudek-kvinon de parolpaneloj. Ni esperas, ke en la venonta numero ni jam povas raporti pri la rezultoj de la konkuro (vd. en la dua numero).

26. Ĉiam rajdi sur la sama afero.
27. Drinkigi sin horizontala.
28. Sidi ĝiskole en la peklo.
29. Orelkaresa melodio.
30. Forkriadi sian fortunon.
31. Kia vento vin alportis?
32. Scii, de kie blovas la vento.
33. Kapo sen klapo.
34. Nur diri, diri la diratajn.
35. Lignavizaĝe gravmieni.
36. Dronigi iun en laŭdoj.
37. Incensi iun ĝis sufoko.
38. Ensalti aferojn kapantaŭe.
39. Intertordi la manojn.
40. Neniodira vizaĝo
41. Ne ia nenia afero.
42. Treti ies honoron.
43. Fortunido.
44. Forlabori korpon kaj animon.
45. Ŝirmalfermi pordon.
46. Funde fuŝi aferon.
47. Draste draŝi iun.
48. Tuttage pendis super ili la pluvo.
49. Forlamenti doloron, forplori ĉagrenon.
50. La tero forglitas el sub liaj piedoj.

K. KALOCSAY

LAJOS TÁRKONY

ESPERANTO

I.

Vi naskas por la mondo multajn bonojn:
lingvo de la scienco kaj tekniko,
vi interpretas multeflankajn konojn,
logikon instruante, mem logiko.
En bunta riĉ' de traduk-mozaiko
disvastas en vi mondliteraturo,
poetojn kreas vi kaj al liriko
vi donas voĉon de velura puro;
multobliganto de vojaĝplezuro
vi geedzigas diversgentajn parojn;
alsorĉas ĉielarkon de l'futuro
inter la homojn forigonte barojn,
kaj kiel la plej benan ter-donacon,
vi almiraĝas tuthomaran Pacon.

II.

Mi rerigardas al vi, Esperanto!
Jen, vi aperis al deksesjarulo
sonora kiel sorĉmodula kanto,
ĉarmo de ĉen' da rimoj, ritmolulo,
monden turnita vasta vortspegulo,
ligilo al amikoj lingve foraj,
tenere tikla sprono por stimulo
minadi al la verstrezoroj oraj,
flugi sur ritmobeloj meteoraj . . .
Kaj nun vi estas, en ĉi mia oldo,
pase' kun pasemaĵoj dolĉmemoraj.
Mi vivos, se mi 'stos sur transa bordo,
per miaj versoj en amika sento.
Kaj se l' amikoj pasos — jam silento.

Esperanto en la hungara gazetaro

Al la ĝojiga evoluo de la Esperanto-movado en Hungario multe kontribuis ankaŭ tiu helpo, kiun donis kaj donas la gazetaro.

Ni faru nun mallongan viziton en la arkivo de *„Népszabadság"* (ĵurnalo de la Hungara Socialisma Laborista Partio), por rigardi: kiom kaj kiel okupiĝas la gazetoj pri nia lingvo kaj movado. En longaj vicoj, de la planko ĝis la plafono amasiĝas la dikaj binditaj jarkolektoj de la ĵurnaloj, revuoj. Troviĝas ĉi tie ĉiuspecaj gazetoj: sciencaj, fakaj, politikaj, literaturaj, aperantaj en Hungario. Malfermu do kelkajn volumojn kaj foliumu en ili. Rigardu unue ĝuste la menciitan ĵurnalon.

Sub titolo *„Esperanto kiel scienca lingvo"*, la eminenta akademiano, *Mór Korach* analizas la barojn, kiujn la lingvaj diferencoj kaŭzas al la sciencistoj. Por solvi la problemon, la artikolo faras konkludon: *„Ni rajte povas diri pri Esperanto, se ĝi ankoraŭ ne ekzistus, oni devus tiun eltrovi. Sed, feliĉe, ĝi jam ekzistas"*. Alian fojon tiu ĉi grava ĵurnalo en unu el siaj dimanĉaj numeroj dediĉis duonpaĝon por la artefaritaj lingvoj. La aŭtoro, *Sándor Hernádi* konigas kelkajn fiaskintajn lingvoplanojn, fine li konstatas: *„Estas jam pli ol okdek jaroj, ke Zamenhof aperigis Esperanton. Dum la jardekoj la lingvo de espero, kiu koncipiĝis en homa cerbo, pleniĝis per animo kaj je la fino de la jarcento ĝi venkis super ĉiu alia artefarita lingvo."* La artikolo skizas per ekzemploj la gramatikon de Esperanto, la manierojn de la vortfarado kaj donas ankaŭ gustumaĵon el la Esperanta poezio, prezentante strofon el poemo de *Petőfi*, tradukita de *K. Kalocsay:*

Tra l' tuta voj' al mia hejm'
Meditis mi konstante:
Kion mi diros al patrin'
Ŝin fine revidante.

Ankaŭ en aliaj tagaj gazetoj ni trovas artikolojn pri Esperanto, kiuj per siaj interesaj titoloj, tuj vekas la atenton de la legantaro: *„Vojo al la anti-Babelo"*, *„Kiuj lernas la latinon de la proletaro"*, *„Komuna Lingvo"*, *„Korespondado unulingve kun multaj landoj"*, *„La vojo de la verda stelo"*, ktp La artikolo pri la demandoj de la disvastiĝo de Esperanto — kiun verkis la plej eminenta hungara lingvisto, *Géza Bárczi* — en la kolumnoj de „Magyar Nemzet" (ĵurnalo de la Patriota Popolfronto) vekis viglan eĥon.

Krom tiuj signifaj artikoloj la ĵurnaloj ofte raportas pri interesaj okazintaĵoj el la vivo de movado.

Ni ne havas kaŭzon plendi ĉi-rilate kontraŭ la revuoj. Ekzemple la literatura revuo *„Nagyvilág"* prezentas — en hungara traduko — Esperantajn poemojn de la eminentaj poetoj: *Marjorie Boulton, Ludoviko Tárkony, William Auld, K. Kalocsay, Jorge M. Maura, Julio Baghy.* En la semajna gazeto *„Élet és Irodalom" (Vivo kaj Literaturo)* ni legis longan artikolon el la plumo de Kalocsay, kiu donas trarigardon pri la Esperanta literaturo. *„La tradukaĵoj — resumas la aŭtoro — el la verkoj de Goethe, Gogol, Proust, Puskin, Shakespeare ktp. pruvas, ke Esperanto, kvankam ĝi estas artefarita lingvo, tamen estas konvena fidele interpreti la perlojn de la mondliteraturo"*.

Oni povus ankoraŭ longe citi kaj konigi artikolojn, kiuj taksas Esperanton pozitive. Kaj interesa statistiko: la „Népszabadság" — aperanta en pli ol 800 000 ekzempleroj — pasintjare komunikis (senpage) proksimume 30 diversajn sciigojn pri la eventoj de la Esperanta movado. Kun ĝojo ni povas konstati: la lingvo de Zamenhof kaj la movado mem ĝuas la simpation kaj apogon de la tuta hungara gazetaro.

Ada CSISZÁR

La Hungarlanda Esperanto-Muzeo kaj Biblioteko

Ĉu estas pli granda ĝojo por la pedagogo ol transdoni la scion al siaj disĉiploj?

— Jes, labori kune kun ili poste — por la sama nobla celo. Ĉar la kreado neniam estas por si mem, sed ĝi estas riĉa fonto por la estonteco.

— Do, sinjoro profesoro, vi estas de jardekoj eminenta esperantisto, kiu instruas ankaŭ la lingvojn rusan, francan kaj germanan, krome vi esploras memstare, vojaĝis eksterlande por fari prelegojn kaj apud tiuj laboroj vi aranĝas la aferojn de la muzeo kaj biblioteko. En ties informa servo vi korespondas en pluraj lingvoj, helpe de la internaciaj interrilatoj vi daŭrigas la kolektadon kaj sisteme ordigas la alvenintajn donaclibrojn. Kiel vi havas energion por ĉio ĉi, ja ankaŭ vi havas tiom da tempo, kiom iu ajn alia pedagogo?!

— Mi posedas malmulte da tempo, kara mia, ĉiam malpli, kaj kiom multe mi intencas ankoraŭ efektivigi! Mi bezonus pli efikan subtenon!

Mi havis ĉi tiun imagitan interparolon kun profesoro Ernő Farkas, kiam mi kolektis la materialon por la nuna artikolo. Iom post iom elformiĝis la bildo pri tiu ĉi senlaca kaj modesta homo, sekve de kies fervora agado fondiĝis la Hungarlanda Esperanto-Muzeo kaj Biblioteko en Szeged, kaj ĝi plenumas sian gravan taskon.

En 1959 kun larĝa senpaga kunlaboro komenciĝis la organizado, kaj profesoro Farkas — koste de penadoj similaj al tiuj de la honorinda Hugo Steiner en Vieno — dum du jaroj metis la bazon de la institucio. El ĉiuj partoj de la mondo alvenis libroj, revuoj, manuskriptoj kun muzea valoro, gramafonaj diskoj, presaĵoj, fotoj, mikro- kaj diafilmoj, gazeteltranĉaĵoj, muziknotkajeroj, mapoj kaj afiŝoj. 95 procentoj de la librotrezoro kolektiĝis el grandanimaj donacoj. La nuntempa nombro de la volumoj estas preskaŭ du mil, kaj ni povas diri, ke nia biblioteko sekvas tuj post tiel famaj institucioj, kiel la Esperanto-bibliotekoj en Vieno, Londono kaj Roterdamo.

Kiaj raraĵoj troviĝas en la kolekto?

— Plurjarcentaj libroj pri la ceteraj internaciaj lingvoprojektoj; inter niaj Esperantaj raraĵoj troviĝas la unua eldono de Hamleto en la traduko de Zamenhof. „La dia komedio" eldonita ital- kaj Esperantlingve, manuskripto de Baghy, broŝuro de Béla Kún verkita dum la Konsilantara Respubliko.

Ĉu multaj vizitas la bibliotekon?

— La institucion ni inaŭguris per aranĝo de impona dokument-ekspozicio en 1961. Tiam ni havis dek mil vizitantojn. Estas karakterize pri la populareco de la biblioteko, ke de jaro al jaro ĝi estas vizitata de multaj personoj dum la Internaciaj Pedagogaj Esperanto-Seminarioj, (kiuj estas aranĝataj de 1964 ĉiusomere,) kaj tempe de la Subĉielaj Teatraj Ludoj de Szeged. Ankaŭ la fama angla esperantista verkistino Marjorie Boulton vizitis foje nian isntitucion.

Kiel oni prilaboris la kolekton?

— La biblioteko estas aranĝita laŭ la sistemo de la internacia decimala klasifiko. Ni jam eldonis librokatalogon, ĝi estas aĉetebla. Ni havas tricent binditajn jarkolektojn de revuoj, ni bindigos ankaŭ la ceterajn revuojn kaj gazetojn se ni sukcesos akiri la mankantajn ekzemplerojn. La ordigo de la muzeo ankoraŭ ne statas tiom kontentige.

Kiel formiĝas viaj interrilatoj?

Multfoje ni pruntas dokumentojn al en- kaj eksterlando, pleje por la ekspozicioj de la pacmovado, fremdultrafiko kaj gazetaro, aŭ por tiuj pri infandesegnaĵoj aŭ afiŝoj. Nia kolekto enhavas preskaŭ ekskluzive multvalorajn malnovajn objektojn. Ankaŭ tiu ĉi fakto klarigas la internacian renomon de la institucio, tial ĝi estas vizitata eĉ el foraj landoj ĉu persone, ĉu letere. La nombro de la aktoj, kiuj cirkulas en la informa servo, estas pluraj centoj jare. Ni jam donis multflankan helpon koncerne la aranĝan laboron al esploristoj laborantaj sur la plej diversaj kampoj. Kelkfoje la petoj estis nekutimaj. Oni jam petis informon ĉe ni pri la Hungarlandaj voj-cirkonstancoj, pri la ebloj de rajdo; en alia kazo elmigrinta hungaro petis kapsikon interŝanĝe por kanguruledo; aŭ persono, kies hungara praulo fuĝis Francujon en la deksepa jarcento, serĉis la loĝlokon de ties pranepoj. Nia eta kolektivo klopodas ĉiam respondi ĉiujn leterojn. Ni konstante korespondas kun konataj esploristoj kaj organizaĵoj. Efektiviĝis strikta kunligo kun la biblioteko de Odeso, la fraturbo de Szeged. Precipe vigliĝis la korespondo kun la sovetaj gesamideanoj de post mia renkontiĝo kun la iama franca sekretario de Leo Tolstoj. Victor Lebrun sekve de mia instigo vojaĝis Sovetunion por transdoni originalajn leterojn de la verkisto — diris Ernő Farkas fine de tiu stranga intervjuo.

Dek jaroj ne estas longa tempo en la vivo de komuninteresa institucio, sed la meritita tutlanda renomo kaj la internacia prestiĝo atestas la utilecon de la tiea agado. Precipe, se ili povus ricevi krom la morala sukceso ankaŭ la indan materialan subtenon.

(Post la partigo de la artikolo ni sciiĝis, ke la Kultura Ministerio subtenis la Esperantan Muzeon de Szeged per 40.000 forintoj.)

Mária SZABÓ



PLILONGIGU VIAN EKSTERLANDAN RESTADON... MALLONGIGU LA VOJAĜTEMPON...

FLUGU PER MALÉV!

Direktaj fluglinioj inter BUDAPEŜTO kaj la ĉi-subaj urboj:

AMSTERDAMO	DAMASKO	LONDONO	PRAGO
ATENO	DUBROVNIKO	LUKSEMBURGO	ROMO
BEJRUTO	FRANKFURTO	MILANO	STOKHOLMO
BEOGRADO	HELSINKO	MOSKVO	SOFIO
BERLINO	ISTANBULO	MUNKENO	TIRANO
VIENO	KAIRO	NIKOZIO	TUNISO
BRUSELO	KIEVO	OSLO	VARSOVIO
BUKAREŜTO	KOPENHAGO	PARIZO	ZURIĤO

MALÉV biletvendejoj:

Budapest V., Váci utca 1.

kaj

Dorottya utca 2.

TELEFONO: 186—805

MALÉV

Magyar Légiközlekedési Vállalat

(HUNGARA AERTRAFIKA ENTREPRENO)

EL NOVAJ POEMOJ DE ISTVÁN SIMON

István Simon (1926—), poeto, tradukisto, ĉefredaktoro de la literatura revuo „Kortárs", flegas en sia poezio precipe intimajn, tenerajn, varme humanajn, eĉ idiliajn tonojn, sed ankaŭ la serĉo de sintezoj, sekco de problemoj, maltrankvilo ne estas al li fremdaj. Li preferas la simplajn, realismajn, kvazaŭ folkloreskajn formojn.

SUR MALNOVA TERPOMA VETURILO

Sunsubir' ne estas en novembro,
en memor' nur sonas niza kriĉ',
kaj humidajn arbojn, por gardendo,
de l'krepusk' transprenas la noktiĝ'.

Vidi lasas febla ĉiellumeto
ĉion post ascendo de l' nebul'.
Taga sun', eĉ brila, 'stas nur reto
al la ĉielo por la hom-okul'.

Sed rigardi alkosme, alhorloĝe!
La montril': timono de l' Ĉiel-ĉar'.
Sub kukol' imaga interkroĉe
vic' da steloj pendas en ĉenpar'.

Plumb' ilia: mia rev' kaj fido,
subiĝadas ja, sed foj' post foj'
mian stelhorloĝon mi, la ido,
post la patro, streĉas sur kampvoj'.

Nia terpomkampo lante vakos.
Hundo bojas, eĉ kun morda vol'.
Iras ĉar'; mi ekkuŝas, ĉar kaphakos
min la lun': la disko de l'pendol'.

EL VORTOJ VIVO

Ankaŭ el vortoj mond', kiu ekzistas,
el ĉiu el ili pec' al mi insistas,
manifestante krias pli kaj pli:
Jen estas mi, komencu jam per mi.
Kaj kune venas la ceter' tumulte:
ekde la lule-baj-baj de la multe
da idoj en bebaĝo, tuta nesto
lulilbalanca, ĝis la akcipitro
de virturment', sed ne estas jam esto
la vorto apud vort' eĉ ĝis verslibro.

Vundbrulaj breĉoj inter ili restas,
kaj ĉesos nur, se ĉiuj mi mem estas;
ke tiuj pecoj-ruboj kunteniĝu,
necesas, ke mortere mi dediĉu
sangon kaj cerbon: menso kaj pasi'
batalas: ne kun turko Dugovics*
luktfalas tag' post tag', sed mi kun mi.
La sang' perdiĝas for eĉ sen verŝiĝ',
mustel' ĝin suĉi el la gorĝ' avidas,
kaj ĉar pri tio ne montriĝas signo,
nek sangon, nek vundfaŭkon oni vidas:
„Li vivis de—ĝis . . ." — staros sur tombligno.

Trad: K. KALOCSAY

* Titus Dugoviĉ, dum la defendo de la fortikajo de Fehérvár (Beograd), ne povante alie malhelpi turkon, ke tiu fiksu la ĉevalvostan flagon sur la bastiono, ĉirkaŭkaptis lin kaj jetis sin kune kun li en la profundon (21. VII. 1456).

Kálmán Csohány

En la pasintaj dek kvin—dudek jaroj la hungara grafikarto atingis Eŭropan rangon, niaj plej talentaj grafikistoj ĉeestas en la grandaj belartaj ekspozicioj de nia kontinento, eĉ de la tuta moderna mondo. Kio estas la sekreto de ilia sukceso? — Tiu sincereco, kiel ili vidas sin mem kaj la mondon, kaj tiu artista kapableco, kiamaniere ili kreas grafikaĵojn. Unu el niaj plej altnivelaj grafikistoj estas Kálmán Csohány, *kiun ni prezentas en nia nuna numero al niaj legantoj.*

Csohány naskiĝis en 1925, en unu el la minej-regionoj de Nord-Hungario. Li lernis en la Budapeŝta Belarta Altlernejo en 1947—1952. Liajn elektitajn grafikaĵojn oni prezentis en la Venecia Bienalo en 1964. Li jam partoprenis en la Tokia, Sanpaŭla, Ljubjana, kaj Lugana Grafikaj Bienaloj, eĉ, liajn verkojn oni povis vidi en ĉiuj ĉefurboj de Eŭropo, krom en Madrido kaj Lisbono. Pro lia arto la hungara registaro donis al li la Munkácsy-premion.

Unu el la brancoj de lia arto estas la libro-ilustraĵo. Lin interesas ankaŭ la ceramiko.

Lian arton karakterizas: la lirismo, teno de ĝusta mezuro kaj la humaneco. Li donas simplajn nomojn al siaj grafikaĵoj: Mortint-priploristinoj, Soleca viro, La birdo, La cervo kaj la steloj, Montoj kaj homoj, La migranto. Sur la titolpaĝo de tiu ĉi nia numero estas videbla la Ŝvebo, kaj sur la 17a paĝo estas lia alia akvaforto, la Malnova foto. Li desegnas la mondon, la homojn, la montojn, la arbojn, la birdojn, la ŝtonon, la akvon nur per malmultaj linioj, li prezentas nur la esencon.

Tamen la Ŝvebo *havas fortan atmosferon, poezion, ĵial estas tiom vivanta la sidanta figuro kaj la tuta naturo. La* Malnova foto *estas la unua peco de serio; sur tiuj eksonas pli nova voĉo de la arto de Csohány: la severa esenco, la maldolĉeto kaj la ironio de la sperta homo, de la saĝa artisto. Sendube: multe sciaspri la mondo tiu kreanto, kiu kapablas vidi sin mem, siajn gepatrojn, siajn samsortanojn kun tia kruela sincereco, tia amo, tia prudenta ironio.*

Mihály GERGELY

Kálmán Csohány: Malnova foto ▶



AKCIDENTO

Verko de Vilmos Benczik

V. Benczik: Studento, nask. en 1945, esperantisto de 1959. Li debutis per poemoj, sed lastatempe aktivas kiel kritikisto, literaturhistoriisto. Akcidento estas lia unua novelo.

Per la maldekstra mano li palpserĉis la ŝaltilon, ŝaltis la lampon kaj ĵetante sencelan rigardon al la kontraŭa muro piede batfermis la pordon.

La ĉambro estis negranda: la trouzita kanapo, la malnova ŝranko kaj la tablo kun la nekomforta seĝo tute plenigis ĝin. Apud la nigran ferforneton li devis starigi ŝirmilon, cetere ĝi jam estus bruliginta la ŝrankon.

Nun la ĉambro estis malvarma, la ne tro grandan fenestron kovris dika glacitavolo — ĝi bone anstataŭis la mankantan kurtenon. Sur la tablo kaj kanapo kuŝis libroj en plena malordo, eĉ la seĝon kovris kelkaj paperfolioj. Petro hezite ĉirkaŭrigardis kaj per abrupta movo ĵetis sian aktujon en la angulon inter la ŝranko kaj kanapo. Demetis la mantelon, pendigis ĝin al la ŝlosilo de la ŝranko, kvankam tio ne multe utilis, ĉar la ŝlosilo estis tre malalte kaj la malsupra parto de la mantelo fakte kuŝis sur la planko.

Li ekfumis kaj maleme iris al la ferforneto, per la malgranda hejtŝovelilo elkuleris la cindron kaj ekhejtis. Tio ne brile sukcesis, ĉar li forgesis malfermi la malsupran aerumpordeton, tamen li lasis la forneton kaj iris al la kanapo, terenpuŝis la librojn kaj ĵetis sin sur ĝin.

Li forlasis la edzinon antaŭ du monatoj. Ŝi estis bona al li, sed ankaŭ ŝi ne povis plendi pro lia konduto. Ili reciproke amis unu la alian, vere amis, ne nur kutimiĝis unu al la alia. Ili geedziĝis tre june, li estis ankoraŭ triajara studento kun multaj ambiciaj planoj kaj revoj. Li studis fervore, kvankam ofte ne la materialon preskribitan en la studprogramo, sed ĉiam celkonscie, ne por kontentigi momentan scivolon. Ŝi ne tro ĝojis, ke ŝia edzo pasigas siajn tagojn, eĉ vesperojn ekster la hejmo — pro la vespera forestado unue ŝi estis ĵaluza, sed eĉ konvinkiĝinte, ke li fakte estas en biblioteko, ŝi ne trankviliĝis. Kiam post la deka li hejmeniris kaj volis daŭrigi la laboron, ŝi ĉiam komencis plendi kaj baldaŭ ekploris. Iom post iom li komprenis, ke ŝi pravas kaj meritas nepre pli da atento kaj zorgo de lia flanko. Kvankam kun iom peza koro, li rezignis pri la vespera laborado en bibliotekoj kaj dediĉis siajn vesperojn al ŝi. Ŝi estis feliĉa kaj ankaŭ li trovis ĉiam pli agrablaj tiujn kune pasigitajn vesperojn. Foje ili iris al teatro, foje al kinejo, kaj — kiam la familia budĝeto permesis — post la prezentado eniris kafejon kaj trinkis glason da kafo, malofte da konjako.

Nature, liaj ekstraj studoj inter tiaj cirkonstancoj malpli rapide progresis, ol antaŭe. Alvenis la lasta jaro kaj panike li ekkomprenis, ke liaj ambiciaj planoj estas nerealigeblaj. Li esperis akiri postenon en scienca instituto, kaj, kvankam pli frue li neniam orientiĝis konkrete pri la realaj eblaĵoj, iel li ne dubis pri la sukceso. La rifuzo estis por li vera tragedio, je ŝiaj konsolaj vortoj li respondis nervoze, eĉ krude. Lian trompiĝon pliigis la fakto, ke por resti en la ĉefurbo — ĝin eĉ provizore li ne volis forlasi — li devis akcepti postenon de instruisto en ĝenerala lernejo.

La kvereletoj inter ili ĉesis, sed li fariĝis silentema, hejmenveninte el la lernejo ĉiam laboris, sed nur malofte li daŭrigis siajn ekstrajn studojn, kutime nur kun hasta pedanteco antaŭpreparis la instruhorojn de la sekva tago. Kvankam neniam li parolis pri tio, ŝi rimarkis la riproĉon, kiu sidis en liaj okuloj.

Foje ŝi provis paroli kun li pri tio, esperante, ke tio helpos la solvon de la strecita situacio. Unue li nekomprene rigardis al ŝi, balbutis ion kaj eksilentis. Reprofundiĝis en la korektadon de la lernejaj kajeroj, sed post kelkaj minutoj li rektiĝis, ekfumis kaj per raŭka voĉo proponis eksedziĝon. Ŝajne ŝi ne miris, ĉar per malgaja voĉo ŝi konsentis kaj faris kelkajn praktikajn demandojn pri la detaloj.

Ĉio fluis glate, sen kverelo. Nun li tamen decidis forlasi la ĉefurbon kaj transloĝiĝis al provinca urbeto. Oni ĝoje lin akceptis; li tuj ricevis postenon en gimnazio. En la unuaj tagoj li sentis, kvazaŭ miltuna ŝarĝo estus forprenita de lia brusto. Ĝuis la liberon kaj post kelktaga ripozo, kiun fakte li pasigis per la ordigo de siaj aferoj, komencis la studadon kun la firma konvinkiĝo, ke maksimume post tri jaroj li nepre sukcesos akiri la postenon en la instituto. Faris diversajn laborplanojn, kalkulante, kiom da liberaj horoj tage li disponas, kaj ĝoje konstatis, ke — se li bone eluzos la tempon — eĉ du jaroj sufiĉos por la certigo de la plena sukceso.

En la unuaj tagoj li ĉiam plenumis, ofte eĉ superplenumis la planon, kiun li kunmetis por si. Sed post iom da tempo li eksentis strangan agaciĝon: ofte li klakfermis la libron kaj eĉ nokte eliris kaj promenadis en la urbeto. Lin turmentis voĉ-soifo, ege li volis paroli kun iu, sed la stratoj en tiu horo estis senhomaj. Se tamen li renkontis iun, kun jubilanta koro enbuŝigis cigaredon kaj petis fajron, kvankam li havis alumetojn, nur por aŭdi ies voĉon. Post tiaj promenoj ĉiam li konstatis, ke temas pri laco kaj decidis pasigi la sekvan vesperon kun kelkaj kolegoj, sed neniam li efektivigis tiun planon: jam estis ekparolonta, kiam abrupte superregis lin tranĉa malemo por tia amuzo.

Ĉiam malpli da laboro li kapablis plenumi. La planon jam delonge li flankenmetis, kiel neplenumeblan. Li pasigis la tempon sidante en kafejo kaj gapante la gastojn, aŭ hejme, kuŝante sur kanapo, kiel ankaŭ nun. En ĉiu minuto li decidis altabliĝi, sed la piedoj iel rigidiĝis kaj ne volis obei. Li pensis pri la edzino kaj provis diveni, kion ŝi faras en tiu ĉi minuto. Amare kaj iom malice li konstatis, ke ŝi fartas nepre pli bone, ol li, sed post momento li ekhontis kaj por forpeli tiajn pensojn, ekfumis. Sed la cigaredo ne bongustis kaj li ekkonsciis, kiom lia kapo doloras. Esplore ekflaris kaj sentis karbodoron. Rigardis al la lampo kaj kun konsterno li vidis, ke en freneza ritmo ĝin ĉirkaŭdancas diverskoloraj literoj C *kaj* O. *La spektaklo teruris lin, li volis stariĝi, sed pro la longa malkomforta kuŝo la piedoj sensentiĝis. Pene li turnis sin al la muro, sed la literoj ne malaperis. Por momento lia menso fariĝis klara kaj li pensis pri la efiko de la karboksido, sed anstataŭ ekstari li nur ĝustigis la kusenon sub la kapo kaj endormiĝis.*

La poŝtisto lin trovis ĉirkaŭ la deka matene: li alportis la telegramon de la bofrato kun informo pri la sinmortigo de la edzino.



DUM VIA VIZITO EN HUNGARIO

la benzinstacioj
de ÁFOR
estas kompleze je via dispono

ÁFOR
BENZIN - OLAJ

D-ro István Szerdahelyi

ESPERANTO-INSTRUADO: METODO KAJ METODOJ

(Fina parto)

De tempo al tempo okazas ,,revolucioj'' en la fremdlingvo-instruado. La unua radikala reformo okazis je la fino de la antaŭa jarcento (1880, Fr. Gouin; 1882, W. Victor), kiam la pliviglîganta internacia trafiko postulis rapidajn sukcesojn. La lasta — okazas en niaj tagoj kaj disvolviĝas antaŭ niaj okuloj. La kaŭzo estas: la kapturniga evoluo de la tekniko, kiu de tago al tago liveras novajn kaj pli novajn principojn kaj aparatojn, kiuj:

A) venkas la tempon kaj spacon kaj akrigas la interlingvan problemon;

B) anstataŭigas ĝis eblo la homan intelekton per ,,pensantaj maŝinoj'' (cibernetiko, instrumaŝinoj);

C) komunikas kaj konservas la homajn voĉon kaj bildojn (radio, televidilo, magnetofono ktp.).

Eĉ unu scienco ne povis eviti la influon de tiuj ĉi novaj fenomenoj: nek la pedagogio, nek la didaktiko. La didaktikon kaj la metodikon ili influas, ĉar:

A) ili urĝas la praktikan, vivan, produktivan alproprigon de la lingvo, t. e. la parolon;

B) ili prezentas novan, pli ekzaktan (kvazaŭ matematikan) esplormetodon de la lingva materialo kaj de la instruprocezo;

C) liveras altevoluintajn teknikajn helpilojn, kiuj akcelas la procezon kaj certigas pli firmajn rezultatojn.

Ĉi tiuj faktoroj elformis la tri fundamentajn principojn de la moderna metodiko:

A) vivproksimeco kaj praktikeco;

B) lingvomedio kaj strukturismo;

C) aŭdo-vida principo.

La plej bona varianto de kombinita metodo estos tiu, kiu scipovos observi kaj apliki laŭ oportuna proporcio la suprajn (A—C) principojn. Ni nomu ĝin KA-varianto (kompleksa-aktiva).

A_1 — Oni instruu lingvon en ties funkcio, t. e. kiel signaron (akustikan aŭ grafikan) por transdoni informaĵojn. Gravas la 4 baz-kapabloj: kompreno-parolo; lego-skribo. La kono de lingva materialo (fonetiko, leksiko, gramatiko) devas nur helpi la ekfunkciigon kaj firmigon de la kapabloj.

A_2 — Oni instruu la cellingvon (en nia kazo: Esperanton) per ĝi mem ĝis ekstrema ebleco. La instruprocezo okazu en tia atmosfero, kiu kvazaŭ devigas la lernantojn uzi la cellingvon.

B_1 — La fundamenta elemento de la komunikaĵo, sekve, la baza elemento de la instruado estas la frazo. Ĉiu lingvo konsistas el certa nombro de bazaj (elementaj) fraztipoj (=strukturoj) kaj la tuta frazsistemo de la lingvo konsistas el la variantoj de tiuj bazaj strukturoj. Ju pli regula estas iu lingvo, des pli malmultenombraj estas ĝiaj strukturoj. Anstataŭ la lernado de gramatiko-teorio kaj multenombraj reguloj, la lernanto alproprigu praktike la funkciadon kaj internajn leĝojn de tiuj strukturoj laŭ didaktikaj fraz-modeloj. La sinsekvo de la strukturoj devas esti strikte konstatata laŭ precizaj principoj (kvazaŭ didaktika-algoritmigo de la materialo).

B_2 — La strukturismo estas lingvo-esplora kaj didaktika principo. Ĝi eniras en la metodikon kiel unu el la principoj, sed ĝia ekskluziva apliko ne estas rekomendinda.

C_1 — La teknikaj instruhelpiloj estas tre efikaj psikologie kaj helpas la efektivigon de la aliaj principoj (A_1, A_2, B_1).

C_2 — La teknikaj instruhelpiloj estas valoraj nur en la manoj de lerta instruistoj: neniam ili povus anstataŭi la ĉeeston de la instruisto!

La metodika literaturo de Esperanto bedaŭrinde estas tre malriĉa. Tio originas en la falsa pritrakto de la problemo, laŭ kiu la ,,facileco'' de Esperanto povas neglektigi tiajn esplorojn. (Ni tuj notu: *la ,,facileco'' de Esperanto manifestiĝas nur en ĝia lingva materialo. La kono de tiu materialo vere postulas minimumam tempon kaj energion. Sed la kapablo praktike uzi ĝin, t. e. paroli aŭ produktive skribi estas jam lingvopsikologia fenomeno, samkaraktera por ĉiuj lingvoj!*)

Ankaŭ la praktiko refutas tiun primitivisman sintenon. Jen nur unu ekzemplo el la tre multaj: en Scienca Universitato Eötvös L. (Budapest) ĉi-jare ricevas la diplomojn la ,,unuaj''. Ili devis aŭskulti dum la lasta jaro ĉiusemajne po 2 prelegojn el ,,Instrumetodo de Esperanto lingvo kaj literaturo'' laŭ oficiale aprobita programo. La studentinoj estis ĉiuj lingvofakaj, sekve, ili aŭskultis paralele samtemajn prelegojn, koncernantajn diversajn lingvojn. Ekzemple unu el ili paralele aŭskultis la instrumetodikojn de la lingvoj angla, germana kaj Esperanto. Vole-nevole ŝi komparis la nivelon de la tri prelegoj. Ĉu vere estas kredeble, ke la ,,primitivisma'' sinteno ĉi-rilate helpus la aŭtoritaton de Esperanto, kiel universitata studobjekto?

La Esperanto-fako kaj la Scienca Rondo Studenta de la Budapeŝta Universitato ĉi-jare komencis la ellaboradon de la bazaj dokumentoj de KA-koncepto:

1. pretiĝas la kompleksa-instruminimumo (KIM = fonetika-leksika-gramatika);

2. pretiĝas la metodika-tipologio en la rilatoj: ugrofinnaj-hindeŭropaj; ugrofinnaj-Esperanto; hindeŭropaj-Esperanto; ugrofinnaj-Esperanto-hindeŭropaj;

3. la algoritmigo de la Esperanto-strukturoj.

Ni kaptas samtempe la okazon tie ĉi alvoki la celkonsciajn gekolegojn komenci la seriozan esplorlaboron kaj eksperimentojn. Esperanto jam devas ja maturiĝi kaj transpasi el la periodo de diletantisma-primitivismo en la periodon de faka matureco.

József Szekeres

Maja rendevuo en Budapeŝto



Detalo el la pavilono de la ekstera komerco

En la jaro 1969 la Budapeŝtaj Internaciaj Foiroj alvenis al pli nova grava etapo de sia evoluo. Tion pruvas la alta nivelo de la oferto de varoj, prezentita de 34 landoj, kiuj partoprenis kiel ekspozantoj en la foiro. La pliintensiĝon de la internaciaskala altira forto de la foiro montras ankaŭ tio, ke plurajn sinanoncintajn eksterlandajn firmaojn oni jam ne povis akcepti pro manko de spaco, kvankam pli ol la duonon de la ekspizicia areo okupis ankaŭ ĉi-foje eksterlandaj ekspozantoj.

En la internacia interesiĝo manifestiĝas la fakto, ke niaj komerco-partneroj juĝas la evoluon de nia ekonomio favora, kaj serĉas la manieron, kiel estigi interrilatojn kun ni, kaj kiel plivastigi tiujn.

Laŭ enhavo la foiro multe ŝanĝiĝis en la pasinta jardeko. Komence la eksterlandanoj prezentis sin unuavice per varoj de la leĝera industrio. Hodiaŭ ili jam serĉas la pretendojn de la hungara merkato, kaj ili kunmetas sian sortimenton konforme al la atendebla interesiĝo.

La gravan internacian rolon de la Budapeŝta Internacia Foiro signas, ke UNIDO (la Industria Evoluiga Organizo de UN), kiu okupiĝas pri la disvolvo de la industrio en la ekonomie evoluantaj landoj, malfermis sian kontoron la unuan fojon ĝuste ĉi tie, por helpi la aktivadon de la reprezentantoj de la evoluantaj landoj, por interveni en la estigo de ekonomiaj interrilatoj, kaj por kontaktigi ilin kun la ekspozantoj, kun la industriaj, ekonomiaj kaj sciencaj ekspertoj.

Tiu foiro pruvis, ke ni lernis, kiel aranĝi grandan industrian-komercan mitingon, ne malatentante ankaŭ la eksteraĵojn, kiel la plaĉajn lokigon kaj prezenton de la varoj.

BIF, aranĝata en majo de ĉiu jaro, estas ponto en la internacia komerco, en la ekonomia kunlaborado kunliganta la kvin kontinentojn. Ni povis esti atestantoj de multaj interkonsentoj kaj kontraktoj, kiuj igas ankoraŭ pli striktaj niajn interrilatojn kun multaj landoj de la mondo.

Dum la dek unu tagoj de BIF la ekonomia kaj komerca sukcesoj kaj tiu ĉe la publiko estas ŝuldebla ne lastavice al tio, ke la en- kaj eksterlandaj entreprenoj bone preparis sin, kaj alportis la kremon de siaj produktoj. Tiel povis elformiĝi sana konkuro inter la entreprenoj kaj inter la varoj.

La maja Budapeŝta rendevuo servis unuavice negocan kaj komercan celojn, kaj la opiniojn kaj impresojn de la kunvenintoj determinas la sukceso de la industriaj kaj komercaj interrilatoj, kvankam tiujn influas ankaŭ multaj ceteraj. Ankaŭ la tradicia hungara gastamo altiras al ni la gastojn. Multaj venas en la tempo de la Budapeŝta Internacia Foiro kune kun sia familio — ĉi tio estas jam ofta okazo, kaj estas legebla en multaj deklaroj — por pasigi ankaŭ la libertempon en nia lando. Estas ĝojo vidi kaj aŭdi tion, ja la simpatio inter la homoj estas decide grava el la vidpunktoj de kaj la interpopola amikeco kaj la negocaj interrilatoj. La amikeco kaj la negoca amikeco estas strikte interdependaj, aŭ almenaŭ en multaj okazoj ili havas ion komunan unu kun la alia. La inĝeniero de iu finna grandentrepreno diris en sia deklaro, ke ne nur parencaj interrilatoj, sed ankaŭ negoca amikeco interligas la du landojn. La direktoro de unu el la plej grandaj sovetaj entreprenoj por komerco kun eksterlando rakontis, ke li havas multege da hungaraj amikoj inter la komercaj kaj industriaj ekspertoj, kun kiuj la intertraktadoj estas kontinuaj kaj senaj je malfacilaĵoj. Kaj volonte venadas al ni — kiel li diras — ankaŭ la inĝeniero de unu el la grandaj okcidentgermanaj fabrikoj. Laŭ la direktoro de la Siria pavilono, ili venis al ni unuavice por nutri la amikecon, kaj sur tia fundamento jam ankaŭ la plivastigo de la ekonomiaj interrilatoj estas kvazaŭ memkomprenebla.

Tiel ĉi respeguliĝas kaj restas en nia memoro la maja Budapeŝta rendevuo de 1969.

Trad.: Tibor UJLAKY-NAGY

La verko kaj la traduko

G. Waringhien

prezidanto de la Akademio de Esperanto

„SOMERMEZNOKTA SONĜO" de *Shakespeare*. El la angla tradukis *K. Kalocsay*. „Beletraj Kajeroj" N-o 31. Eld. J. Régulo Pérez, La Laguna, 1967; 99 pĝ. sub ilustrita kovrilo.

Tiu ĉi teatraĵo apartenas al la unuaj verkoj de la granda angla dramisto, kaj tuj oni tion konstatas, kiam oni komparas ĝin kun la verkoj de lia matura aĝo, Hamleto, Otelo, Makbeto, Reĝo Lear k.a., pri kiuj oni vere povas diri, ke li sondis la abismojn de la homa koro. Tion oni certe ne povus diri pri ĉi tiu komedio, kies personoj havas apenaŭ skizitan psikologion. Tio estas aparte frapanta, kiam oni konsideras la ĉefan peripetion, la interŝanĝon de la amobjektoj inter la du paroj Lisandro-Hermia kaj Demetrio-Helena; ĝi estus povinta liveri okazon al fajnaj psikologiaj observoj, al pikantaj scenoj, se ĝi devenus el la kapricoj, koleretoj aŭ fieriĝoj de la amantoj mem, kiel ekz-e en la „Dépit amoureux" (Kverelo de amantoj) de Molière, aŭ en „La double inconstance" (La duobla malfidelo) de Marivaux; sed Shakespeare senigis sin je tiuj ŝancoj, ŝuldigante tiun animŝanĝon al ekstera kaŭzo, al la magia interveno de Oberono: tiel liaj amantoj pli aspektas kiel pupoj ol kiel veraj homoj. Oni komprenas, ke tiu „Sonĝo" estis plurfoje elektita por prezentado sur teatro de marionetoj.

Ankaŭ la kostuma pompo de la du reĝaj kortegoj tiu de la homa kaj tiu de la fea reĝo, la dekoracia diverseco, la lerta kontrasto inter la leĝereco de la feoj kaj la plumpeco de la vilaĝanoj, sume ĉio, kio faris el tiu „sonĝo" la tipon de kortega distraĵo, probable verkita okaze de nobela edziĝo, lasas nin hodiaŭ iom indiferentaj: la feojn ni plu ne kredas, kiel en la tempo de Shakespeare ankoraŭ multaj kleruloj, kaj niaj amatoraj trupoj plu ne rekrutiĝas inter senkleraj metiistoj.

La eterna valoro de la „Sonĝo" kuŝas aliloke: en la poezieco de la Shakespeare-a fantazio, en la muziko de lia lingvo kaj versarto — kaj ĝuste tial tiu parto el lia verkaro estas plej malfacile tradukebla. Eble estis tiu malfacileco mem, kiu altiris la atenton de Kalocsay, post lia heroa lukto kun la epika tono de Reĝo Lear: malofte unu sama tradukisto decidis fronti, unu post la alia, du tiel malsamajn originalaĵojn, kaj malofte unu sama tradukisto sukcesis redoni kun egala sukceso kaj la tragikajn lamentojn de Lear, kaj la spritajn kanzonojn de Pukk.

Mi ne sentas min sufiĉe intima kun la Shakespeare-a poezio por diri, ĉu tiu ĉi traduko nenion perdis el la muziko de la anglaj versoj, sed mi povas aserti, ke en nia Esperanto mi neniam legis tiel dancantajn, tiel flugantajn versojn. Plurfoje mi haltis en mia legado kun la iluzio, ke mi legas tekston originale verkitan en nia lingvo, kaj ĉiufoje mi devis memorigi al mi, ke tio ja estas traduko el fremda, malproksima lingvo — tiel senĝene kuras la rimoj, tiel senskue ligiĝas vortoj kaj frazoj, tiel pure sonoras la lirikaĵo. Mi volis fari komparon kaj tial mi relegis kelkajn poemojn originalajn, ankaŭ kelkajn paĝojn de alia Sonĝo, tiu sub pomarbo: nu, fariĝis evidenta, ke tiuj versoj, kiuj impresis plej libere, nature, klare kaj spontane, estas ne la originalaĵoj sed la Kalocsay-a traduko.

Tian esceptan ŝancon ni dankas al la longega sperto kaj senĉesa prilaborado de tiu unika tradukisto. Helpis ankaŭ la kelkaj licencoj, kiujn li permesas al si en la prozodio kaj kiuj povas esti grava helpo ankaŭ al aliaj tradukistoj. Tia estas ekz-e la kunfandiĝo de du samaj vokaloj fine kaj komence de du sinsekvaj vortoj:

kaj en la boskon, kie en lok' izola . . .

poste la mallongigo *'stas* anstatŭ *estas*, kiun, iniciatitan de Grabowski kaj reprovitan de Maura, Kalocsay lanĉis en sia Lear-traduko tre singarde, el la buŝo de la frenezoŝajniga Edgar, sed ĉi tie jam uzas, kiel montriĝantan tre oportuna, tute libere: ne malpli ol 16 ekzemplojn mi kalkulis; mi notis ankaŭ la utilan senfinaĵan uzon de *nul* kaj *kelk* (ĉi lasta, cetere, devenas de Grabowski), kaj la konjunkcian uzon de *ajn* antaŭ *ĉu*, por la plifortigo de ĉi ties senco de egalŝanca elekto: „ajn ĉu Lisandro mortis, ajn ĉu ne". Ĉio tio povas nur riĉigi la esprimrimedojn de la poetoj. Sola punkto al mi malplaĉis: la triradikaj kunmetoj: krom la titolo mem mi notis du tiajn: *pomrostaĵ-imite* kaj *franc-kronkolora*. Al mi ili donas impreson de malgracieco, kaj mi plu restas ĉe la konstato de Zamenhof, ke „en nia lingvo la vortoj estas pli naturaj kaj pli bonsonaj, se ili estas ne kunligitaj, sed uzataj aparte". Do „Sonĝo de Somermeza Nokto" estas pli konforma al la lingvospirito ol „Somermeznokta Sonĝo".

La tradukon sekvas postparolo, komentaro (tamen, la Biblia „levjatano" estas ne baleno sed krokodilo), kaj glosaro de vortoj ne troviĝantaj en PV kaj ties Suplemento. La tradukinto emfazas, ke li ne uzis ĉi-libre vorton, kiun li ne aplikis jam aliloke; ĉi tio eble trankviligos kelkajn animojn, sed aliparte ankaŭ lin mem faris pli senzorga ol kutime, tiel ke neglositaj restis kelkaj vortoj troveblaj nur en mia EF-vortaro aŭ en la vortaro de Butler kaj eĉ unu (pita = malgrandaĉa) trovebla nur en la glosaro de la Lear-traduko.

La libron belege presis Stafeto: jen, en nia biblioteko, nova juvelo, kiu varmigos la koron de ĉiu amatoro de beleco; jen, en nia literaturo, nova konstruo, kiun — se mi aŭdacas parodii Shakespeare kaj Kalocsay — kunmetis la

Kalmana metiist' el Budapeŝto.

ORIGINALA ESPERANTO-POEZIO

BALADA AMO

Patrino
Patrino
Kio mankas al vi filo

Patrujo
Patrujo
Ne hontu suferegi ulo

Edzino
Edzino
Necesas al mi trankvilo

Ho patrio
Ve patro
Venu do venu ĉi-tien astro
kaj estu mia plej kara gasto

PÁL AVAR



Nask. 1924., kuracisto, scienca kunlaboranto en la Budapeŝta Laborhigiena Instituto. Ekde 1951. li publikigis hungare — krom multnombraj fakartikoloj — kelkajn poemojn, novelojn kaj tradukaĵojn el pluraj lingvoj: el la angla, franca, germana, slovaka kaj ankaŭ el la Esperanta literaturo. Li esperantistiĝis en 1962.

La poemoj de Pál Avar, verkitaj originale en Esperanto, unuafoje aperas nun, en nia revuo.

NUPTO

Fluetas lunlakto
Sur la arbfolioj
ĝisfunde laŭ trunko

Sterniĝas la amo
sub lanugpeplomo
sekvas la posedo

Ekbolas la ŝaŭmo
ondkresto de l'sango
rezistas la bordo

Proksime al rodo
persistas la nuno
inflamas ĉielo

Ekrosas la ŝvito
benita inundo
ploras la tagiĝo

Ĉesis la komenco

INTERNA MONOLOGO

Estas bona, diable bona sento, se iu mortas,
iu el la informitaj pri nia sekreta peko,
el la okaze atestintaj ĉe nia malforteco . . .
Dio pardonu! Apud ĉies tombo mi malpeziĝas.

Post perdo de l'vidinta min falema,
ege vanta, mizeraĉa, ŝveba
leviĝas alten, pli alten mia memstatuo.
Benita morto! Feliĉe, ke tiuj kaj ĉiuj iam pereas.

Eĉ ili mem ĝojas, ĝuste, vere ekripozinte,
de siaj kulpetoj, malfortecoj liberiĝinte
kaj, precipe, min poreterne absolvinte.
Nur tiuj estas niaj bonfaruloj, kiuj mortis.

Eble ankaŭ . . . la malproksimen migrantaj,
la neniam returniĝi dezirantaj,
pri siaj bonŝanco, eĉ rezidejo nin ne sciigantaj.
Elkore ni priploras ilin, kiuj posedis ion pri ni.

Por mi jam sufiĉas, se mi foje interkverelis
per nepasema kolero, per arda, neestingebla malamo,
kiel la infanoj en tiuj sinceraj ludoj.
Kaj vespere, se mi rigardas tra la fenestro,

gaje mi vidas leviĝi miajn mortintojn kontraŭ la ĉielo.
Ia fortego ĵetadas ilin alten, pli alten,
dum mi scias: nur mia sopiro ŝajnas tia forto,

sed ĝi ne fruktas ion. Niaj amindaj neniam fariĝas steloj.
Ili ne gardas niajn sonĝojn, kiel patrineto tiun de sia bebo.

Kaj mi scias, ke neniu mortas por ĉiam kaj eterne.
Ĉar el la sin' de l'koro re-kaj renaskiĝas
— simile al pekoj — la novaj spionoj de nia homesto,

por ke estu bona, diable bona sento, se iu mortas,
iu el la informitaj pri nia sekreta peko,
el la okaze atestintaj ĉe nia malforteco . . .
Dio pardonu, se mi refoje malpeziĝos!

MALLAŬTE NUR!..

Estingu jam la malkaŝantan lumon,
ne vidu min, la nudan blankharulon!
Ek, ludu ni la ludon ĝis la fino,
do braku min iama belulino!

Imagu nin ĉirkaŭ la sin' de l'valo
pelante-mordi, ŝirme de l'montaro!
Imagu fari Leĝon, vi homido
eĉ tie ĉi, en ĉifa amorlito!

Kaj pensu, ke mi estas virga viro,
unuas, kaj ne lastas por mi ino!
Kaj pensu, ke ni povas krei amon,
eblas kunfajri, formi idealon!

Mallaŭte nur, ve! Sub la lum' de l'luno
necesas, sed ne licas nia umo.
Mallaŭte, kara, ĉesu la amveo,
ne veku la gepatrojn — en tombejo!

Pensoludo pri la ritmo de la tempo

Verkis Lajos Jánossy
(Parto)

Lasttempe ĉe ni kaj aliloke modiĝis paroli pri tio, ke la tempo akceliĝas. La radio, televido, gazetaro kaj revuoj ofte okupiĝas pri tiu temaro. Cetere la demando ne estas nova, kaj nun ni rekontiĝas kun la momenta nova impeto de la tiudirekta interesado.

Nombraj filozofiaj kaj popularigaj verkoj — malnovaj kaj novaj — okupiĝas pri ĉiuspecaj fantastikaj ecoj de la tempo. Antaŭ nelonge mi legis komikan romanon, en kiu iu ekiras de hejmo dek jarojn post la mondmilito. Dumvoje en la arbaro li vojeraras ie kaj sur ĉirkaŭvojo li revenas en la militan tempon. Psikologie eksterordinare interesa estas la animstato, kiel la ĉefrolanto de la libro divenas, ke li revenis en la forpasintan tempon.

Jam klasikiĝinta romano de Mark Twain: „Jenkio en la kortego de reĝo Arhur" temas pri tio, ke uzinmastron de maŝin- kaj armilfabriko batfaligas unu el siaj laboristoj dum disputo kaj sekve de tiu vundo li refalas en la sesan jarcenton. Tie en la kortego de reĝo Arthur li rekontas kavaliron Lancelot kaj la aliajn kavalirojn de Rondtablo, poste konstruas modernan civilizacion. Por ke la afero iĝu eĉ pli mistika, komence de la romano oni prezentas kirason de kavaliro, vivinta en la sesa jarcento, sur kiu estas eta truo. Ĝi aspektas precize same, kiel spuro de pistolkuglo. Metiĝas la demando, kiel do estiĝis la truo sur la maŝkiraso, kaj la ĉefrolanto de la romano, kiu konstateble el la pluaj partoj de la romano ĵus revenis el sia 1300-jara „ekskurso", asertas: „Mi vidis la kirason truiĝi." — Poste aldiris —: „Mi truis ĝin."

La translokigon en alian epokon de okazadoj de foraj jarcentoj, la transsalton de jarcentoj — kvankam per alia antaŭsigno — ni trovas ankaŭ en la romano de Kálmán Mikszáth: „Új Zrínyiász" (Nova epopeo pri Zrínyi).

En tiuj kaj en verkoj aplikantaj pluajn nombrajn similajn ilojn — miksiĝas nuntempo kaj pasinteco. Ĉi tiujn — plej ofte la malĝustaĵojn de la propra epoko de la verkisto satirigantajn, cetere interesegajn — fabelojn nature neniu akceptas, kiel seriozan — almenaŭ, kio koncernas la fakton kaj eblojn de la revojaĝo en la tempon antaŭ pluraj jarcentoj.

Tr. János TÓTH

Korespondi deziras

(En ĉi tiu rubriko ni presas nur anoncojn de niaj abonantoj.)

25-jara f-ino Alžbeta *Kurcsinková*, KOŠICE, Nové Mesto, Kysucká 2, Ĉeĥoslovakio, kor. kun ĉiuj landoj.

S-ro Vytautas *Mukas*, VILNIUS 9, abond. d. N-o 278, Sovet-Litovujo, kor. kaj int. BK.

35-jara s-ro Stanislav *Svárodsky*, MIMON, Letna 209, okr. Česka Lipa, Ĉeĥoslovakio, kor. kaj int. BK, fotojn ktp.

23-jara studento Kltodzimierz *Fiszer*, LODZ, ul. Piotrowska 37/52, Pollando, kor. kun diversaĝaj esp-istoj pri vojaĝo, jaĥt-turistiko ktp.

19-jara poŝtistino Vaičius *Albertas*, Sporto 2, PALANGA, Sovet-Litovujo, kor. kaj int. PM, BK.

36-jara inĝ. Eduard Boer, Kazgiprocvetmet, UST-KAMENOGORSK — 13, Sovetunio, VKO, kor. prefere kun Hungario, Pollando, Ĉeĥoslovakio, Hispanio, Francio ktp.

17-jara studento László *Pálhidai*, ZALAEGERSZEG, Landorhegyi u. 5. B. 1. Hungario kor. kun geknaboj el la socialismaj landoj kaj Italio.

K. In. *Aristarkov*, LENINGRAD D 40, Dovostrebovanija, int. diskojn kaj alumetetikedojn.

56-jara fervojisto, malnova e-isto Tomam *Oldrich* kor. pri vojaĝo, fotado, int. E-aĵojn. Kamenská ĉ. 933/98. DEČIN, Ĉeĥoslovakio.

30-jara librotenisto József *Egyed*, str. Gábor Áron 18, COVASNA, Rumanio, kor. pri urboj, artmemoraĵoj, pinakotekoj, kol. BK.

17-jara f-ino Francoise *Roland*, 144 rue de Belfort, 25 BESANCON, Francio, kor. pri artoj, civilizo, junularaj movadoj.

18-jara f-ino Heléne *Lazar*, 52 rue Henri Baigue, 25. BESANÇON, kor. pri teatro, klasika danco, muziko, sporto kaj politiko.

19-jara f-ino Christiane *Ottmann*, Lett Sup. Lycée Pasteur, 25 BESANÇON, kor. pri ĉiuj temoj.

21-jara Antono *Madej*, TOMASZÓW-MAZ 1, il. Szeroka 27-a, Pollando, kor. pri foto, filmo, teatro, int BK kaj turismajn prosp.

28-jara inĝ.-projektanto Al. *Vajsberg*, UST-KAMENOGORSK, 18, str. Alma-Atinskaja 56, ap. 21. Sovetunio, kor. pri pentroarto; int. reproduktitajn pentraĵojn.

25 gelernantoj, 16-jaraj, kor. pri ĉiuj temoj. KECSKEMÉT, Gimnazio Bányai Julia, Esperanto-Grupo.

39-jara traktoristo Miroslav *Lunga*, SKORONICE 110, okr. Hodonin, Ĉeĥoslovakio, kor. kaj int. BK kun Hungario.

17-jara Danuta Stankiewicz, ul. Swierczerwskiego 12, BABIMOST, woj. Zielona Góra, Pollando, kor. kun ĉiuj landoj, int. fotojn de geaktoroj kaj diskojn.

21-jara Marianna *Anderson*, Vintervädersgatan 3, IV, 417 36, GÖTEBORG, Svedio, kor. kun e-istoj, kiuj skribas E-e klare kaj simple.

30-jara Alla *Nesterova*, filologino, PERM. str. Gagarina 107/5—5, Sovetunio, kor. k. ĉ. l. pri arto de Hindio, la literaturo, int. BK.

34-jara inĝ. G. J. *Ŝevĉenko*, ul. Libknehta 15, kv. 32. DNJEPROPETROVSK—70, Sovetunio, kor. kun filatelistoj, int. PM kaj BK.

18 knaboj (18—22- jaraj) kor. pri div. temoj. László *Juhász*, KISBÉR, pf. 014, Hungario.

Internacia Esperanto-ekspozicio de infandesegnaĵoj en Budapeŝto

„La infandesegnaĵoj estas iaspeca internacia lingvo. Per siaj desegnaĵoj la infanoj bildigas, ofte emocie, siajn impresojn pri tiuj objektoj aŭ sociaj rilatoj de sia ĉirkaŭaĵo, kiuj aparte altiras ilian atenton aŭ interesiĝon. Sub la influo de tradicioj, vivmaniero kaj la aktuala medio, la desegnaĵoj ofte malkovras apartaĵojn, karakterizajn por la koncerna lando aŭ regiono, sed ili kutime ankaŭ manifestas komune homajn trajtojn.

La Internacia Lingvo detruas la lingvajn barojn kaj ebligas mondskalajn senperajn kontaktojn de homo al homo. La infandesegnaĵoj malkovras la identecon de infanoj. Ĝojoj kaj ĉagrenoj, iliaj ridoj kaj larmoj konfirmas la veron, ke infanoj ne konas limon."

Mi citis el la mesaĝo de d-ro profesoro *Ivo Lapenna*, prezidanto de UEA, kiun mesaĝon li sendis okaze de la Budapeŝta inaŭguro de la Internacia Esperanto-Ekspozicio de Infandesegnaĵoj. La grandan signifon de la infandesegnaĵoj agnoskis la Esperanto-movado, kiam jam antaŭlonge komencis la organizadon de ĉi tiaj ekspozicioj.

Ilia nombro kreskis per la ekspozicio organizita de la Hungara Esperanto-Asocio en Budapeŝto, inter 24. 5.—15.6. 1969. En la ekspozicio, kies temo estas la ludo, povas partopreni infanoj inter 6—14 jaroj kun siaj desegnoj. La loko de la ekspozicio estas la elementa lernejo en la strato Tomori (13-a distrikto).

I. premio: La desegnaĵo de Maria Sallai Hungario



I. premio: La desegnaĵo de Kerry Leamy Nov Zelando

El preskaŭ kvincent desegnaĵoj de 17 landoj devas elekti la ĵurio la plej bonajn, kaj tio ne estas facila tasko. Finfine la sekvanta vicordo elformiĝis:

1a premio: Kerry Leamy, 10 jara, Nov-Zelando; Maria Sallai, 10 jara, Hungario. *2a premio:* Debelak Miran, 11 jara, Jugoslavio; Nora Trojane, 12 jara, Aŭstrio. *3a premio* Marie-Noelle Beltzung, 12 jara, Francio; Claudia Kunert, 8 jara, Germanio; Andrea Wilhelm, 14 jara, Hungario.

Premiojn meritis: Vladimira Cinerova, 12 j. Ĉeĥoslovakio, Danka Kukovec, 12 j. Jugoslavio, Dora Péter, 8 j. Hungario, Siegmar Handke, 12 j. Germanio, Tania Heaslip, 6 j. Nov-Zelando, Maija Pölönen, 11 j. Finnlando, Marja Raax, 13 j. Nederlando, Gaston Rafael, 5 j. Hispanio, M. Szarejova, 9 j. Pollando, Tamara Bojko, 10 j. Sovetunio.

La organizantoj sciigis la sendintojn de la ekspoziciitaj desegnaĵoj, ke iliajn desegnojn oni ekspoziciis; ja la ekspozo de multaj centoj da desegnaĵoj ne estis ebla, la publiko povis rigardi nur la plej bonajn.

La premiojn – mondfamajn gramafondiskojn de Bartók kaj Kodály, Esperantajn librojn kaj hungarajn manlaboraĵojn – jam ricevis la venkintoj.

Ni ekspozicios la desegnaĵojn post Budapeŝto en pluraj hungaraj urboj. La organizantoj volonte akceptos la invitojn ankaŭ de fremlandaj Esperantaj asocioj aŭ grupoj.

Johano INGUSZ

NIA HUMURO

LA AVENTURO DE REĜO KACOR EN PERSUJO

Komence de 1956 la hungara ambasado en Irano sendis interesan libron al Gyula Ortutay (fama hungara folkloristo, tiam ministro de klerigado). La libro estis la verko de Sobhi, la eminenta persa folkloristo, kiu, surbaze de pluraj fabelkolektoj de Ortutay, eldonis la komunan volumon de la hungaraj kaj persaj fabeloj.

Ortutay ne konis Sobhi-n, la scienciston, sed tiu per sia ornamoplena persa manskribo kvazaŭ endesegnis sian dediĉon en la volumon senditan al sia hungara kolego. Ankoraŭ pli kurioza estas la historio de la volumo. Kiel Ortutay poste eksciis: la unuan eldonon de la volumo la Irana cenzuro konfiskis. Nome, en la volumo troviĝis la hungara fabelo pri Kacor. Tiu Kacor estas nia popolfabela figuro: reĝo Kacor (virkato, kiu per sia aplomba konduto igas kredi la simplajn bestojn, ke li estas reĝo). Sed vane oni forlasis en la titolo de la fabelo la vorton reĝo de apud la nomo Kacor, en la teksto ĝi restis en pluraj lokoj.

Domaĝe, ĉar la Irana cenzuristo eĉ en la fabelo toleras nur la leonon kiel reĝon. Kaj pro tio, ke simpla virkato volis arogi al si ĉi tian moŝtecon, la akrevida atentemo de la cenzuristo — tuj ekstermis ĝin.

Kiam Ortutay eksciis la historieton, bonhumore citis la popolfabelan karakterizadon:

Kat', leono sama speco,
Nur malsamas la grandeco.

El la kolekto de Imre Szenes
Tradukis: Tibor Ujlaky-Nagy

István Békés:

ANEKDOTOJ

Sekvas tre malnova historio, el la kulmino de la kariero de la eminenta hungara verkisto Zsigmond Móricz, kaj ĝi estas sufiĉe konata. Sed ĝi montras ĉarman, renversitan pensadon de simpla homo, do estas inde denove rakonti ĝin. En la ĝardena domo de Móricz en la vilaĝo Leányfalu somerumis du fremdaj sinjoroj. Pli ĝuste ili parte somerumis kaj parte laboradis, ĉar unu el la sinjoroj pretigis la germanan tradukon de la romano „Estu bona ĝis la morto", la alia sinjoro faris la francan varianton de la romano „Pura oro" (Ambaŭ librojn verkis Zsigmond Móricz).

Zsigmond Móricz sidas jam frumatene en la verando, ĝiskole en granda laborado. Jen venas al la domo la vilaĝa masonisto, kiu konstruis la domon de la verkisto.

— Bonan matenon, Sinjora Moŝto! — li salutis la verkiston. — Ĉu vi akceptis eble somerumantojn? Mi ja vidas du fremdulojn en la etaĝaj ĉambroj . . . Ĉu ili estas ĉambroluantoj?

— Ne ĉambroluantoj — respondas la verkisto —, sed gastoj. Pli ĝustedire: ili venis ĉi tien ne gastadi, sed ili laboras por mi . . .

— Ĉu ili laboras? — ekmiras la mastro. — Kaj kion ili laboras?

— Ili tradukas. La pli alta sinjoro tradukas al germana lingvo unu el miaj romanoj, la pli malalta tradukas alian romanon al la franca. Kaj mi mem ĉi tie sur la teretaĝo skribas la romanojn en hungara lingvo.

La mastro balancas sian kapon.

— Tio estas jam io! — li diras kun rekona palpebrumo. — Via Moŝto estas granda ruzulo. Vi elektis la pli facilan parton de la laboro!

*

Antaŭ prezentado, dum la tago nia eminenta aktoro Gyula Gózon eĉ gluton da trinkaĵo ne gustumis. Sed post la prezentado okazis, ke li trinkis glaseton da bona vino. Se la vino estis tre bona, li trinkis du glasojn, eble ankaŭ tri glasojn. Dum ilia bela, longa geedza vivo nia eminenta aktorino, la kara Lili Berky, multe kverelis kun la edzo pro tiuj du-tri glasetoj.

La aktoro-edzo foje alvenas hejmen al Rákosliget post noktomezo. La edzino jam dormas. La ŝuojn li demetas, kaj en ŝtrumpoj, sur piedfingropintoj li ŝtelas sin en la dormoĉambron. Sed la maldorma aktorino Lili vekiĝas:

— Ĉu vi estas, Gyula?
— Gózon indignante respondas:
— Mi. Kial? Kiun vi atendis?

József Vető:

AFORIZMOJ

Kelkaj homoj supozas, ke ili havas puran konsciencon, kvankam nur ilia memorkapablo malfortiĝis.

Inter la formoj de la regado la plej malfacila estas la memregado.

La pomo falas kelkfoje ne nur malproksimen de sia arbo, sed ĝi eĉ forruliĝas.

Se la superfluaj vortoj kostus monon, multaj homoj rapide malriĉiĝus.

Ankaŭ la kapro havas barbon, tamen ĝi ne estas saĝa.

La memgolo estas memgolo eĉ se ĝi bele estas ŝotita.

Li estas tre modesta homo, se li devas juĝi pri la talento de aliaj homoj.

Li parolas tiel konfuze, ke eĉ mensogi li ne bezonas.

Tradukis: L. Kökény

Preciza aĝo

— Kiom da jaroj vi havas Ladiĉjo — demandas onklo la etan knabon.

— Mi estas kvinjara, onklo, mi petas.

— Vi estas kvinjara kaj tamen vi estas nur tiel granda, kiel mia ombrelo?

— Pro kio? Kiom da jaroj havas la ombrelo de la onklo?

Manko de laborforto

— Ĉu vi laboras ĉi tie?
— Mi.
— Kaj kiu estas la laborestro?
— Mi.
— Kaj kie estas la konstruestro?
— Mi estas ĉi tie.

Kolektis kaj trad. Lenke KUN

Esperanto 2-Daŭriga kurso

Esperanto-lernolibro por 10—14-jaraj infanoj, 2-a volumo. Verko de d-ro István Szerdahelyi.

Ni ĝoje prenis en la manojn la duan volumon de la moderna lernolibro de d-ro Szerdahelyi. La unua, malgraŭ kelkaj eraroj, estas unu el la plej bonaj Esperanto-lernolibroj, formale por la 10—14 jaruloj, sed efektive en ĉiu aĝo uzebla.

La nunan verkon oni devas eĉ pli alte taksi. Unika fenomeno en Esperantujo: daŭriga kurso samkaraktera kun la unua volumo, kie oni lernas respektive instruas ne nur la lingvon, sed krome per *Esperanto* infanoj kaj plenkreskuloj ricevas utilajn konojn, interesajn sciojn. La temaro de la libro ebligas efektivigi la duoblan celon: instrui per kaj en Esperanto.

Metode la lernolibro estas redaktita laŭ postuloj de la plej moderna didaktiko. Plaĉe karakterizas ĝin multaj ilustraĵoj, samlingvaj klarigoj, luda formo.

Tamen oni devas paroli ankaŭ pri la mankoj, en intereso de la verkinto kaj uzontoj.

Tre bone, ke en la lernolibro trovigas originalaj verkoj de Emba, Bérci, Deŝkin, Baghy, Tárkony, ĉar la aliaj ĝenerale entenas literaturajn verkojn de Zamenhof kaj preskaŭ nenion plu. Sed inter la tradukaĵoj estas en granda plimulto hungaraj verkoj. Tio kontraŭstaras la internacian ideon de la Esperantlingva tradukarto, celanta konatigi trezorojn de diversaj kulturoj.

Ne ĉiam estas kontentigaj ankaŭ la samlingvaj tradukoj. La klarigoj estas preskaŭ la samaj kiel en la PV, sed tio ne ĉiam kovras la veran sencon de la vortoj. Ekzemple *aŭguri* estas klarigita: *„diveni pri estonteco laŭ flugado de birdoj (en antikva Romo).“* Sed la legaĵo tekstis jene: *„Ambaŭ aŭguris brilan estontecon al Ludoviko“*. Ĉu laŭ flugado de birdoj en la antikva Romo?

Iom ne plaĉis la ideologia enhavo de kelkaj klarigoj. Ekzemple la klarigo de la vorto *Dio: „supernatura estaĵo“* sen mencio *„en religioj“*, aŭ pri la *fato* staras: *„antaŭfiksita superega leĝo de la okazontaĵoj“* kvazaŭ tio vere ekzistus.

Grava problemo de nia movado estas la pritakso de Esperanto. La moderna koncepto: *naciaj lingvoj evoluis preskaŭ senkontrole kaj ili servas al interkompreniĝo inter la anoj de unu popolo, unu nacio. Esperanto estis konscie verkita por interkomprenigi ĉialingvajn el ĉiuj nacioj.* Tamen en la lernolibro staras la tezo: *„Esperanto estas ne nur lingvo. Ĝi estas portanto de noblaj ideoj kaj strebadoj“*. Efektive „la noblaj ideoj kaj strebadoj“ iam naskis kaj volas venkigi Esperanton hodiaŭ, sed la lingvo en si mem (ni ĉu volas ĉu ne) povas esti uzata por la plej noblaj kaj plej fiaj celoj.

La principo de sufiĉo kaj neceso ne ĉiam karakterizas la vortojn de la libro. Ekzemple: *„Ĉu vi sunbanis?“* anstataŭ *„Ĉu vi sunbanis vin (aŭ sunbaniĝis?),“ nigra tabulo* (bela gallismo), *televido* anst. *televidilo, romano* anst. *romiano*, ktp.

Tute ne estus utile instrui al la lernentoj ĉiun neologismon, sed ne estus eraro, se ili konus la plej gravajn „antimalvortojn“, ĉar ili jam ofte troveblas en la populara literaturo kaj eĉ en la parollingvo. Ekzemple *ascendi, descendi, pigra, olda, dista, lanta*, ktp.

Pri la ilustraĵoj oni povas diri, ke ili estas solvitaj bone, la lernolibro estas riĉe ilustrita. Kelkfoje tamen ne troviĝas desegnaĵoj, kiam ili devus esti. Ekzemple ne estas bildo al la vorto *blazono* ĉe la ekspliko *„insigno de la lando“* kaj ekzempla sintagmo *„blazono de Hungario“*.

La ekzercoj estas bonaj, nur kelkfoje tro malfacilaj. Ekzemple kiam staras nur punktoj anstataŭ konsonantoj: „. . o . . o (okazas vintre)“. Ne estas simple diveni, ke temas pri *frosto*.

La supraj linioj tute ne signifas, ke la libro ne plaĉis. Kontraŭe, ĝi estas tiom bona, tiel alia ol la jam konataj, ĝenerale konvena al la plej modernaj postuloj, ke ĝi vere indas la seriozan kritikon anstataŭ senkritikaj laŭdoj. Aperigi korektitan eldonon pro teknikaj kialoj veršajne ne eblas, sed konante la mankojn, instruanto povas eviti kelkajn erarojn. Same aliaj instruistoj, kiuj en diversaj landoj planas redakti similajn lernolibrojn, povos bone utiligi la pozitivajn kaj negativajn spertojn de la recenzita verko.

Tibor VÖLGYI

MOMENTFOTO

Fragmento el poemo de Lajos Tárkony.



Vertikale: 1. La kamparano faras. 2. Se oni vidas koton . . . 3. Pronomo sen i. Prefikso sen i. 5. Vokalo 6. Danco. 7. Malbono sen finaĵo. 8. Kruela sporto. 9. Vokalo. 10. Parto de la kapo. 11. Komenco de pronomoj, 12. Laĥdezira faro. 13. Dezirata de virinoj. 18. Granda rivero. 20. Komerca dokumento. 23. Ne-Esperanta litero. 24. Oni uzas ĝin ĉefe en vintro. 26. Transdoni scion. 33. Opero. 35. Pariza in' sen supersigno. 37. Ne tie. 40. Devo dum leciono. 42. Parto de tono. 43. Reflekšiva pronomo. 45. Oni verŝas ĝin en teon. 46. La almozulo faras. 47. Ĝustige. 49. Eta obstaklo por šipo, finaĵo a. 50. Similas al vertikala 8-a vico. 51. Tia estas la krakeno. 55. Afrika urbo. 57. TNV. 59. En kelo. 63. Mallongigo: ribelintoj en Afriko. 68. Konsonatoj en sufikso. 70. Sufikso formanta numeralon.

Horizontale: 14. Grumašino ĝin faras. 15. Malbona. 16. Demanda vorto. 17. Bona sento. 18. Konsonantoj de glandolikvaĵo. 19. . . . enda antaŭ uzo. 21. . . . via volo. 22. Šakludanto faras, kiam venkas; la mankanta fino de la frazo: . . . omon. 27. Sentoj de malfeliĉaj urbanoj el Japanujo. 28. Konsonanto. 29. Konsonantoj el la vortoj: sia sango. 30. Anatomia esprimo, sen finaĵo. 31. Flate voki, retroen. 32. Prepozicio. 34. La literoj de urbo OTAVO. 36. Rivero en Brazilo. 38. Konsonanto. 39. Pronomo akuzativa. 41. Amindumi. 43. Reflekšiva pronomo. 44. La floroj havas; sen finaĵo 46. Ĉiutaga manĝaĵo. 47. Agrabla ag'. 48. Atesto pri . . ., kiam oni finas la mezlernejon. 50. Finiĝo. 52. Konsonanto. 53. Vokalo. 54. Modelo estas. 56. Tia estas la pentraĵo. 58. Konsonantoj el korpoparto. 60. Kiu koleras iun. 61. Legomaĵo, sen finaĵo. 62. Trinkaĵo. 64. Sufikso. 65. Komenca. 66. Likvaĵe. 67. Kaŭĉuko estas. 69. Oni faras el ĝi ujon.

Ensendenda: horizontala 1. vertikalaj 14. 25.

Szilárd BÁLINT

El la solvintoj de niaj kruĉvortenigmoj 1966—67 gajnis libropremion: M. Hromas, Hradec Kralove, ČSR, Joel Silverman, New York, Tanja Prebrojenskaja, Zagorsk, USSR, Olavi Kaleva, Boras, Sved., Alec Venture, Surrey, Ang., Panas Vasilĉenko, Kiev, USSR.

Esperanto, Studobjekto en la Budapeŝta Universitato

Ekde septembro 1966 Esperanto, lingvo kaj literaturo, estas akceptita „C" fako en la *Filozofia—Filologia Fakultato de Universitato Eötvös Loránd.*

Espereble ne estos tute superflue antaŭ ĉio paroli pri kelkaj demandoj de fako-sistemo de la Universitato koncernantaj ankaŭ nian fakon. En nia fakultato ĝenerale oni studas du fakojn; tio povas esti: ambaŭ fakoj por fariĝi mezaŭ altlerneja profesoro, (nomataj „profesoraj fakoj") aŭ iu el la du fakoj por fariĝi alia scienca laboristo. „neprofesoraj fakoj" / Esperanto apartenas al la tn. „profesoraj fakoj", sekve la diplomo rajtigos fariĝi profesoro de Esperanto.

Ĉe ni estas uzataj, krome, tri kategorioj de fakoj. Fakoj „A" signifas kvinjaran fakon, per kiu oni komencas sian universitatan studon. Oni devas elekti du el ili. Post unu jaro oni povas specialiĝi, te. lasi iun el du fakoj „A" kaj preni iun „B" kvarjaran, kiu estas speciala branĉo de la ne forlasita „A" fako. (ekz. angla lingvistiko kun angla „profesora"; ĝenerala lingvistiko kun iu ajn lingva „profesora" fako). Fakoj „C" estas trijaraj, oni povas preni ilin post la dua studjaro kiel trian fakon, sed en la antaŭa kurso oni devas studi enkondukajn lecionojn. Krome, la fakojn „B" kaj „C" povas preni nur kelkaj, kiuj atingis bonajn rezultojn en la studo de antaŭaj fakoj. Eksterlandanoj povas preni la fakojn laŭ alia regulo.

Nun kelkajn vortojn pri la komenco de universitata instruado de Esperanto en Budapeŝto.

Laŭ iniciato de *d-ro Szerdahelyi, Antal Koós* la tiama aganta sekretario de HEA, sendis petleteron al la Ministerio de Klerigado. La respondo venis rekte de la anstataŭanto de katedrestro de Ĝenerallingvistika Katedro, *docento J. Balázs,* kiu informis HEA-n pri la permeso de la Ministerio, kaj petis delegi iun por pritrakti la detalojn. HEA delegis d-ron Szerdahelyi. La estraro de la fakultato komisiis s-ron Szerdahelyi organizi kaj gvidi la fakon. Tie mi devas mencii kaj danki la valoran moralan helpon de profesoro *akademiano Géza Bárczy.*

De tiam en ĉiu dua jaro komencis la studon novaj kursoj. La instruprogramo estas la jena:

Enkondukajn studhorojn povas viziti kiu ajn, ĝi estas nur kvazaŭ lingvokurso. Post sukcesa enkonduka kurso la studentoj en sia tria studjaro — se la Dekano ebligas al ili preni Esperanton kiel trian fakon — devas alproprigi perfektan lingvokapablon, konatiĝi kun la bazaj principoj de gramatiko de Esperanto, kompare al la hungara kaj ekkoni la historion kaj movadon de nia lingvo. En la dua studjaro de Esperanto – t. e. en la kvara universitata jaro studobjekto de studentoj estas literaturoj originala kaj tradukita. Tio estas realigata en du studhoroj prelegaj kaj unu seminaria. Krome, oni aŭskultas prelegojn pri lingvistiko, sistema gramatiko en du studhoroj ĉiusemajne. En la lasta studjaro estas studata interlingvistiko ĝenerale kaj instrumetodo de Esperanto. En la sama jaro faras la profesorkandidatoj ankaŭ lernejan praktikon en la Budapeŝtaj ĝeneralaj (komencaj) kaj mezaj lernejoj, kie Esperanto estas instruata.

Ni havas eĉ malgrandan bibliotekon el la heredaĵo de profesoro *Erdélyi,* la estinta dekano de Teologia Akademio. Entute 203 volumoj, klasikaĵoj originalaj kaj tradukitaj, 58 jarkolektoj de 24 gazetoj kaj revuoj.

Nia *Scienca Studenta Rondo* laboras bone. La gestudentoj en 1967 partoprenis la Internacian Studentan Seminarion de STELO en Torun. Tie f-ino *Magda Bartha* gajnis unuan premion per laboraĵo: „La scienca valoro de Esperanto." En 1969 en la Tutlanda Konkurso de Sciencaj Studentaj Rondoj gajnis kvaran premion f-ino M. Bartha kaj s-ino. *Sághi* per sia: „Tipologio de prekibernetikaj lingvomodeloj" La saman gajnis f-inoj *S. Marinovich* kaj *M. Bonifert* per „La motivigo de temoelektado en la originala kaj tradukita literaturo de Esperanto". La prelegoj estas akre diskutitaj dum la regulaj kunvenoj de Studenta Rondo. Krom la premiitaj laboraĵoj f-inoj *I. Tiegelmann* kaj *M. Kertész* ellaboris la temon: „La filozofoj de XVI—XVII jc. pri la ebleco de artefarita lingvo", f-inoj *M. Homolya* kaj *A. Szabó:* „La 'zonola' teorio kaj la interslavaj lingvoprojektoj". Kolektinte la artikolojn de niaj gestudentoj ni intencas eldoni almanakon.

Tiuj ĉi ok studentinoj, en la tempo de apero de la artikolo jam profesorinoj junaj kaj agemaj, estas la unuaj ne nur en Hungario, sed en la tuta mondo, kiuj ricevis ŝtatan diplomon universitatan, rajtigan al instruo de la Internacia Lingvo.

La dua serio same atingas bonan kaj bonegan rezultojn en la studo de nia lingvo. Ĉiuj el ili intencas utiligi per kaj por Esperanto la sciojn akiritajn en la universitato. Inter ili troviĝas estontaj historiisto, bibliotekisto, lingvisto kaj mezlernejaj profesoroj. (La verkinto de ĉi artikolo faras sian diploman laboraĵon el la tereno de fonetiko de Esperanto.)

La daŭrigo de instruado povas esti certigata nur se nia laboro estas bezonata, kaj rekonata eĉ de eksterlandaj sciencaj universitataj aŭtoritatoj. Certe ĉiuj esperantistoj sentas la gravecon de la afero. Ni petas vin atenti pri nia laboro, helpi per konsiloj kaj bonvolaj kritikoj.

Estas dankende al ĉiuj, kiuj partoprenis en la realigo de tiu signifoplena ago, la envicigo de Esperanto inter universitatajn studobjektojn. Aparte ni dankas al nia profesoro s-ro Szerdahelyi.

Tibor VASKÓ

LA HUNGARA UZINO DE OPTIKAĴOJ

Budapest 114. Pf. 52. Telex: 259.

Produkta sortimento:

Geodeziaj instrumentoj
Laboratoriaj instrumentoj
Vitrofadenaj medicinaj instrumentoj
Periferiaj unuoj de komputeroj
Okulvitro-lensoj
Okulvitro-garnajoj
Fluid-mezuriloj
Vekhorloĝoj
Optikaj iloj
kaj aparatoj
Diversaj
mezuriloj
kaj kontroliloj

MOM
BUDAPEST

NOVAĴOJ DE ESPERANTUJO

La oficiala organo de UEA, la revuo „*Esperanto*", daŭrigas sian progreson direkte al modernaj aspekto kaj enhavo. Ekde la numero de majo 1969, „Esperanto" havas novan, modernstilan litertipon. Jam de unu jaro la revuo estas multe pli abunde ilustrita, ol antaŭe. La enhavo fariĝis pli varia, kaj la prezento estas tiel populara, kiel ĝi povas esti en la limoj de sia rolo kiel oficiala kaj reprezenta organo de la movado.

*

La nova plurlingva revuo de CED, „La Monda Lingvo-Problemo", *aperis unuafoje en decembro 1968, okaze de la Tago de Homaj Rajtoj. En majo eliris, laŭplane, la dua numero de LMLP. La tria kajero (3 numero — 1 jarkolekto) estos preta en septembro. Per tiu revuo, CED, (Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo) klopodas penetri en tiujn klerajn mediojn, kie ĝis nun la lingva problemo estis miskonata kaj neglektata, kaj kie la Internacia Lingvo estis amkoraŭ pli miskonata. Per seriozaj studoj de internacie konataj fakuloj ĝi celas veki la atenton de influhavaj personoj en ŝlosilaj medioj, dum la uzado de Esperanto kiel redakcia lingvo kaj por la ampleksaj resumoj de la artikoloj daŭre atentigos pri tiu solvo de la problemo. — Ni gratulas kun sincera ĝojo al la nova revuo.*

*

Estrara kunsido de UEA decidis, ke la 55a Universala Kongreso de Esperanto okazos en la aŭstra ĉefurbo *Vieno*, de la 1a ĝis la 8a de aŭgusto 1970.

*

Citaĵo el la artikolo de J. L. Muller *(Komuna Esperanto Gazeto, organo de la Federacio de Esperanto-organizoj de Nederlando): „Esperanto kaj la esperantismo troviĝas ankoraŭ en senfina cirklo. Multaj homoj estas konvinkitaj pri la grandega utilo de Esperanto. Ili certe lernus ĝin, se la lingvo estus ĝenerale aplikata, sed ĉar la praktika apliko estas ankoraŭ eta, ili ankoraŭ ne komencas la studadon. Ni devas do trovi vojon por rompi tiun cirklon.*

Mi plene subskribas la tezon de prof. Lapenna, ke la cirkonstancoj en la mondo rapide maturiĝas por la solvo de la lingva problemo kaj ke paralele kreskas la ŝancoj por ĝeneraligo de la uzo de Esperanto kaj ke tial necesas agi tuj kaj ĝisfunde. De ĉiuj esperantistaj organizoj kaj de ĉiuj unuopuloj dependas, ĉu ni scios ekspluati tiun ĉi unikan okazon . . ."

LETERKESTO

D-ro Johano Hamvai, 29 Arran St., Avondale, AUKLAND, 7., NEW ZEALAND. — Ni citas el via letero: „. . . Kiam mi esprimas al Vi kaj al la kunlaboranto de la nova H. V. mian sinceran bondeziron por pluaj sukcesoj, permesu al mi prezenti min kaj mian opinion post la tralego de tiu ĉi novperioda, unua numero . . . Vi petas kaj deziras la opiniojn de la legantaro, do, ankaŭ mi volonte plenumas vian deziron, ĉar mi ne havas pli sinceran sopiron, ol ke la gazeto evoluu kaj fariĝu la gvidanta literatura organo de la tutmonda movado! Mi ja scias, ke tiu ĉi plano ne estas facile atingebla, sed la hungara esperantistaro jam foje pruvis al la mondo, ke ili kapablas je tio!

Vi, estimata Samideano, en via gvidartikolo, „Saluto al niaj legantoj", en la 1a numero, 1969. — laŭ mia modesta opinio, sed ankaŭ de miaj nov-zelandaj, francaj kaj svedaj amikoj, — kun rajta fiero diris: *„Ni kredas, ke ne estas fanfarono tiu ĉi konvinkiĝo: pro la ĝisnuna laboro Hungara Vivo troviĝas inter la plej altnivelaj Esperanto-organoj de la mondo"*. — Kun tiuj ĉi vortoj kaj kun planoj de la nova redakcio ĉiu leganto kaj amiko de la H. V. konsentas. Nur, kio ŝajnas manki el via "Saluto"-artikolo, ke fariĝis forgesita la (ĉiam kaj ĉie kutima) mencio, ke en la *ĝis nun* atingitaj, elstaraj rezultoj kaj internacia respekto de la gazeto *almenaŭ* certan parton kaj meritojn havas ankaŭ la ĉefredaktoro dum la komencaj (do, plej malfacilaj) jaroj: *Samideano Ludoviko Kökény . . .*"

Estimata Samideano! Vi estas prava. En mia artikolo mi parolis pri la meritoj de la redaktoraro, sennome. Mi devas konfesi, ke estis tiel malmulta. Vi povos vidi en nia 4-a numero la artikolon, en kiu K. Kalocsay parolos kun Ludoviko Kökény, pri lia kvindek jara laboro en la Esperantomovado. Mi dankas viajn sincerajn vortojn.

*

Vjeko Peŝut, *NOVSKA, Jugoslavio.* — *Ni citas el via letero: „En 'Heroldo de Esperanto' mi legis pri la gazeto Hungara Vivo. Mi intencas aboni ĝin. Tamen, pli frue mi petas Vin bonvolu sendi al mi unu provekzempleron . . .*" — Feliks Debrowski, *CZĘSTKOW, Pollando.* — *Vi skribis: „Mi estus tre dankema, se Vi sendus al mi unu numeron de Hungara Vivo. Mi jam aŭdis pri ĉi tiu renoviĝinta revuo, sed mi ankoraŭ ne havas ĝin. En la venonta jaro mi intencas aboni ĝin . . ."*

Ni ĝojas, ke Vi ambaŭ deziras aboni la renoviĝintan Hungaran Vivon, kaj ni esperas, ke Vi rekomendos nian revuon ankaŭ al Viaj geamikoj, Viaj gesamideanoj, Viaj samklubanoj. Po unu ekzempleron de HV ni jam sendis al Via adreso.

Al niaj karaj legantoj en la demokratiaj landoj. — *Ni informas Vin, ke laŭ la oficiala sciigo de la hungara gazetdisvastiga entrepreno KULTURA nia revuo, Hungara Vivo, estas abonebla — krom ĉe la abonejoj indikitaj sur la lasta paĝo — principe jam en ĉiu poŝtoficejo de Via lando. Ke tiu ĉi — cetere tre aprobinda — principo kiel efektiviĝas en la praktiko, pri tio ni atendas Vian bonvolan sciigon. La sama principo estas valida ankaŭ en Sovetunio.*

*

Al s-ano Myĥajlo *Ĥromej*, Ukrajno, Sovetunio. — Kun atento ni legis Vian raporton — samtempe ankaŭ nekrologon — pri la vivovojo de la eminenta Ukrajna redaktoro, eldonisto kaj popularigisto *Orest Kuzma*, la organizinto de la unua E-societo en Ukrajno, redaktoro kaj eldonisto de la ilustrita gazeto „Ukraina Stelo" (1912—13), pedagogo kaj gvidinto de multaj E-kursoj, aŭtoro de la unua E-lernolibro por ukrajnanoj, tradukisto, senlaca propagandisto, samtempe vera internaciisto kaj humanisto. 76 jara li mortis decembre de 1968. La Ukrajna E-movado perdis homon tre valoran en lia persono.

Por povi kunmeti la bibliografion pri lia verkaro, s-ano Ĥromej kaj liaj kunlaborantoj petas ĉiun, kiu konis lin, aŭ eventuale scias pri la trovloko de iuj el liaj tradukoj, bv. skribi al s-ano Myĥajlo Ĥromej, KOLOMYJA, Biblioteko N 1, Ukrajna SSR, Sovetunio.

*

Ni atentigas niajn legantojn, ke la adreso de nia redakcio estas: Redakcio de Hungara Vivo, BUDAPEST VIII., Kenyérmező u. 6. Hungarlando Leterojn de ĉia speco, koncernantajn nian revuon bv. sendi nepre al tiu adreso.

El la 4-a numero de Hungara Vivo

Nia forumo
Reformo de la hungara ekonomio
Mihály Gergely: Soleca telefonulo. Novelo
K. Kalocsay: La plej belaj vortoj
Lajos Tárkony: Revuo de revuoj
Sándor Szathmári: Donna Juana. Novelo.
Lajos Tárkony: Poemoj
L. Kökény Novaĵoj el la teknika vivo
Nuntempa hungara poezio: László Nagy kaj Margit Szécsi
Grafikartisto: Endre Szász
József Szekeres: Vojaĝo en Italio
Valéria Szabó: Hungaraj popolkutimoj je la fino de la jaro. (Per fotografaĵoj)
Jozefo Mátéffy: Pensoj pri la Helsinka Kongreso
Diskuto
Juneco, juneco! (Novaĵoj, interesaĵoj)
K. Kalocsay: Domfabriko
Nur al la virinoj
Recenzo. Nia humuro. Leterkesto.

Atentu!

Malnovaj ekzempleroj de Hungara Vivo estas mendeblaj aŭ aĉeteblaj persone en la redakcio. La prezo de unu ekzemplero estas 6,4 forintoj.

La novaj abonantoj de Hungara Vivo ĉiuj ricevos kvar malnovajn ekzemplerojn, senpage, — Abonu nian revuon; vi povos kompletigi ankoraŭ nun ne tro malfacile la pli malfruajn jarkolektojn.

Alsenditaj libroj por recenzo

W. Shakespeare: Somermeznokta sonĝo. Trad: Kolomano Kalocsay. Eld: Stafeto, Beletraj, kajeroj. J. Régulo, La Laguna. (Vidu la kritikon de G. Waringhien.)

Arkadij Gajdar: Du noveloj. Eld: Komisiono pri internaciaj ligoj de sovetaj esperantistoj. Moskvo, 1968.

Ŝaraf Raŝidov: La Kaŝmira Kanto (legendo). Eld: Komisiono pri internaciaj ligoj de esperantistoj de Uzbekistano. Taŝkent.

Fervoja terminareto, Esperanta—Hungara, Hungara—Esperanta. Redaktis: d-ro István Bácskai. Eld: Hungara Sekcio de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio, Fervojista Fako de la Hungara Esperanto-Asocio.

*

Ni petas la eldonistojn, bonvolu alsendi por recenzo du ekzemplerojn.

GLOSARO:

secesio: artstilo ĉirkaŭ la turniĝo de la 19a jarcento. Ĝin karakterizas forflankiĝo de la ĝisnuna, kutima kaj apero en frapanta nova eksterajo.
atitudo: sintenado
madrigalo: plurvoĉa kontraŭpunkta kanto ĝenerale sen akompano (Muz. Term.)
motelo: hotelo por turistoj kun aŭto
ĉardo: specifa hungara vilaĝa drinkejo el la pasintaj jarcentoj
demografio: scienco okupiĝanta pri la naskiĝ-kvanto kaj ties ŝanĝoj
kolirio: likva medikamento, kiun oni gutigas en la malsanan okulon
algoritmo (en la metodologio): logika, ekzakta sinsekvo de instrueroj
metodologio aŭ *metodiko:* parto de la didaktiko, kiu studas la instru-praktikon de iu studobjekto.
leksiko: a) parto de la lingvistiko, kiu studas la vortinventaron (= leksikologio); *b)* la tuto de ĉiuj vortoj de iu lingvo
tipologio: branĉo de la moderna lingvistiko, kiu komparas la opajn lingvojn laŭ ilia strukturo
strukturismo: lingvistika koncepto, laŭ kiu la lingvo konsistas el certa nombro de frazotipoj, kiuj estas modeligeblaj; la „skeleto"-n de tiuj frazoj oni nomas strukturo.
sintagmo: konstanta rilato de diversnivelaj lingvoelementoj
kartveloj: nomo de la popolo loĝanta en la soveta respubliko „Gruzia", kun la ĉefurbo Tbilisi

ABONO DE HUNGARA VIVO EN EKSTERLANDO

Peranto al eksterlando: KULTURA Budapest, 62, P. O. Box 149. — Sumoj de abonprezo por unu jaro en pluraj ĉefaj valutoj: Usonaj dolaroj = 2,—; sterlingaj funtoj = 0—16—6; francaj frankoj = 10,—; okc. germanaj markoj = 8,—.

Perantaj firmoj en la diversaj landoj:

AŬSTRIO: Globus (VAZ), Höchstädtplatz 3, A—1200, WIEN I.
Rudolf Novák Gmbh., Köllnerhofgasse 4, A—1011, WIEN I.

AŬSTRALIO: Cosmos Bookshop, 145 Ackland Street, ST. KILDA Vic. A. Keesing, 168—174 Day Street, SYDNEY, N. S. W. 2000

BELGIO: Agence Messagerie de la Presse, Rue du Persil 14—22, BRUXELLES

BRAZILO: Livraria Brody Ltda., Caixa Postal 6366, SAO PAULO.
Livraria D. Landy Rua 7 de Abril, Caixa Postal 7943, SAO PAULO

BRITIO: Collet's Holdings Ltd., Denington Estate, London Road, WELLINGBOROUGH.
The Danubia Book Co., 78 Shaftesbury Avenue, LONDON W. 1.

BULGARIO: Direkzia R. E. P. 11 Pl. Slavejkov SOFIA

ĈEĤOSLOVAKIO: P. N. S. — dovoz tisku, Vinohradska 46, PRAHA 2. P. N. S. — dovoz tisku Leningradska 14, BRATISLAVA

ĈINIO: Waiwen Shudian, P. O. B. Nr. 88. PEKING

DANLANDO: Hunnia Books and Music Langemosevej 37, BAGSVAERD.
Ejnar Munksgaard Prags Boulevard 47, COPENHAGEN/S.

FINNLANDO: Akateeminen, Kirjakauppa, Keskuskatu 2, HELSINKI

FRANCIO: Agence Littéraire et Artistique Parisienne 7 Rue Debelleyme, PARIS 3. Société Balaton 12 Rue de la Grande Batelière, PARIS 9.

GERMANA DEMOKRATA RESPUBLIKO: Zeitungsvertriebsamt, Fruchtstrasse 3—4, 1004, BERLIN

GERMANA FEDERACIA RESPUBLIKO: Újváry-Griff Titurel strasse 2, 8 MÜNCHEN 81.
Kubon und Sagner, Schliessfach 68, 8 MÜNCHEN 34. Kunst und Wissen, Postfach 46, Wilhelmstrasse 4, 7 STUTTGART 1. W. E. Saarbach, Follerstrasse 2, 5 KÖLN 1.

ISRAELO: Hadash, R. Nesz Ciona 4, TEL-AVIV Lepac Ltd., 15 Rambam, TEL-AVIV Gondos Sándor, Herzl 16, Bét Hakranot HAIFA A. Fischer, R. Strauss 3, JERUSALEM

ITALIO: Avv. Andrei Lazar, Via Monte delle Gioie 24, ROMA S. Co. Lib. Ri., Piazza 33, ROMA

JAPANIO: Nauka Ltd., 30—19, Minami-Ikebakukuro 2-chome, Toshima-ku, TOKYO

JUGOSLAVIO: Forum, Vojvode Misica broj 1, NOVI-SAD Jugoslovenska Knjiga, Terazije 27, BEOGRAD

KANADO: Délibáb Film and Record Studio, 19 Prince Arthur Street West, MONTREAL 18. Que. Pannonia Books, 2 Spadina Road, TORONTO 4, Ont.

KOREO: „Chul Bo" PHENJAN

NEDERLANDO: Swets et Zeitlinger, Keizersgracht 487, AMSTERDAM C.

NORVEGIO: A/S Narvesens Litteratur Tjenste P. O. Box 6140 Etterstad, OSLO

POLLANDO: P. K. W. Z. Ruch, ul. Wronia 23, WARSZAWA

RUMANIO: OSEP, Gara de Nord, BUCURESTI OSEP, ORADEA

SOVETUNIO: Sojuzpechatj. Import Prospekt Mira 112—a MOSKVA

SVEDIO: A. B. Nordiska Bokhandeln, Drottninggatan 7—9, 110 10 STOCKHOLM 1. A. B. Sandbergs Bokhandeln, Sturegatan 8, 114 37 STOCKHOLM 5.

SVISIO: AZED AG., Dornacherstrasse 60/62, BASEL 4200. Szerday Binningerstrasse 55, ALLSCHWILL

USONO: Center of Hungarian Litterature Inc., 1538 Scond Ave., NEW YORK 10028. Corvin Travel and Gift Parcel Service, 1590 Second Ave., NEW YORK 10028. Hungarian Books and Records 11802 Buckeye Road, CLEVELAND, Ohio 44120

VENEZUELO: Luis Tarcsay, Calle Iglesia Ed. Villoria Apt. 21—105, C. 24. CARACAS

VJETNAMO: Phong Phat Hanh Bao Chi 17, Dinh Le. HANOI

Hungaroj abonu por eksterlandanoj laŭ la avizo sur la 1-a paĝo!

FILATELIO

Okaze de la kvindeka jarreveno de la Hungara Konsilia Respubliko aperis poŝtmarkserio kun desegnoj de la tiutempaj afiŝoj. Grava parto de la tiamaj hungaraj artistoj estis tre impresiĝema al la revoluciaj ideoj, kaj ili atendis de la Konsilia Respubliko pli liberan elvolviĝon de la artoj. En la kreaĵoj de la artistoj esprimiĝas rapida reago al la eventoj de tiu epoko.

1-a figuro. — 40 filera PM. Varbafiŝo de la grafikartisto Ödön Dankó (1889—1958). Ĝia teksto estas: „En la ruĝan armeon!"

2-a fig. — 60-filera PM. Desegno de kapo de Lenin. Ni ne konas la nomon de la artisto.

3-a fig. — 1-forinta PM. La artisto estis: Rezső Steiner, pentristo el Sopron 1854—1945). La afiŝo kun subskribo „Fine!"

4-a fig. — 2-forinta PM, afiŝo de la artistoj Imre Földes (1881—) kaj Gusztáv Végh (1889—). La afiŝo kun la teksto „El socia produktado devenas la bonstato" instigas al pli granda produkta laboro.

5-a fig. — 3-forinta PM. Afiŝo pretigita de nekonata artisto. Ĝi figuras ruĝarmeanon kun la teksto: „Vi, kontraŭrevoluciulo, kaŝe en mallumo disvastiganta falsajn terurinformojn, tremu!"

6-a fig. — 10-forinta folio (94×70 mm). Kreaĵo de la grafikisto kaj pentristo Róbert Berény (1887—1953) kun la teksto: „Kaptu armilon! Kaptu armilon!"

Miklós LETT

Trad: L. KÖKÉNY

Latva Poezio 1945-1966.

— Eld. Zvaigne, Riga 1968. — 14 × 10 cm. — 70 paĝoj. — Prezo 17 kop.

Surprizo el nordo: junaj latvaj poetoj prezentataj al la mondo en la Internacia Lingvo. Dum legado la modesta libreto tranformiĝas en ian magian spegulon, kaj en ĝi aperas la moderna vivo de la apud-Balta lando en rava multfaceteco. La novaj latvaj poetoj ŝajne preferas mallongajn versformojn, per kiuj ili kvazaŭ nuntempaj bardoj prikantas indajn agojn, laŭdas grandulojn de la nacio kaj homaro, vekas entuziasmon, admiras belecon de la homo, verkoj kaj naturo. Amplenaj, amikemaj animoj skizas varmvoĉe siajn porhomajn, pacamajn sentojn inter la vastaj horizontoj de maro kaj ĉielo. Ĉio ĉi spegulas sincere vivantan, severe strebantan, modestan popolon, kies poeto-gefiloj fidele sekvas-helpas la evoluvojon de la socio-patrino.

E. FENYVESI

Kiamaniere redonis mian vivemon Esperanto?

Antaŭ ne longe mi suferis gravan operacion. Preskaŭ mi mortis. Post la operacio min interesis nenio, mi kuŝis en la lito apatie. Ĉion mi aŭdis, kio okazis ĉirkaŭ mi, sed dume mi pensis, ke estis tute malutile savi mian vivon. Por kio, kaj kial mi devas plu vivi? — Tamen post kelkaj monatoj, malgraŭ mia volo, iom post iom mi plifortiĝis. Por ripozi mi forvojaĝis al Galyatető, kie mi pasigis du belegajn semajnojn. Estis vintro. La pejzaĝo estis mirinda, la ĉielatingaj pinoj brilis de neĝblankaj prujnoj.

Tiutempe ĉiu lernejo havis vintran ferion. Dume mi interkonatiĝis kun instruistino, kiu informiĝinte, ke mi estas Esperantisto, kun granda ĝojo diris, ke ankaŭ ŝi lernas la lingvon, eĉ ŝia kolegino en la ĉambro, jam tre bone parolas Esperante.

Ekde tiu tempo ni triope kunvenis ĉiun posttagmezon, por konversacii. Baldaŭ mi rimarkis, ke iom post iom ni havas aŭskultantojn, interesiĝantojn. Memkompreneble mi tre ĝojis, kaj mia animo pleniĝis de feliĉo kaj fiero.

Dum du semajnoj ĉiu homo ĉirkaŭ ni estis vigla, ĉarma. Pere de Esperanto elformiĝis agrabla societo. Sed post paso de la dusemajna ferio, niaj novaj amikecoj ne ĉesis. De tiu tempo alvenis la leteroj, unu post la aliaj, el diversaj provincaj urboj, kie ili loĝas kaj instruas, memkompreneble en Esperanto.

Mi mencias ankoraŭ, ke inter la aŭskultantoj troviĝis juna instruistino, al kiu tiel plaĉis nia babilado, ke reveninte al sia hejmo, ŝi tuj komencis lerni, nur aŭtodidakte, ĉar en tiu malgranda urbo ŝi ne havis eblon viziti kurson aŭ klubon. Ŝi jam kelkfoje vizitis min, en mia Budapeŝta hejmo, kaj dum nia konversacio mi konstatis, ke ŝi estas tiel diligenta kaj lerta, ke certe baldaŭ ŝi povos fari almenaŭ la „A" ekzamenon.

Nun mi pensas, ke ĉiuj miaj bonaj gesamideanoj jam eltrovis, kial mi rakontis mian travivaĵon? — Denove mi komencis kredi, ke la vivo estas tamen bela, precipe se oni havas eblon transdoni el sia scio (eĉ se nur malmulte) al la homoj.

Márta NÁDASDI

medimpex

Hungara Eksterlandkomerca Entrepreno
pri Farmaciaj Produktaĵoj

Budapest, 5. • Poŝtkesto 126

EKSPORTAS-IMPORTAS

Farmaciaj specialaĵoj • Farmaciaj bazmaterialoj • Vakcinaĵoj por hom- kaj best-terapeŭtikaj celoj • Veterinaraj drogoj • Furaĝaldonaĵoj • Laboratoriaj kemiaĵoj • Biokemiaj produktaĵoj • Radioaktivaj produktaĵoj • Volatilaj oleoj • Kuracplantoj • Resanigaj kaj amaraj akvoj

90-jara estas

LA UZINO DE ELEKTRAJ APARATOJ GANZ

La produktaĵojn de tiu mondfama fabriko al 60 landoj eksportas

La Hungara Eksterland-komerca Entrepreno de Elektraj Aparatoj

TRANSELEKTRO

Budapest V., Münnich F. u. 13. POB. 377.
Telefono: 120—790